




Dumonata kultura informilo kaj esprimilo esperantista
Unu numero : 5 FF. Unujara abono kun adresaro : 28 FF
Ĝiri al la poŝtkonta numero 3371 74 M BORDEAUX profite al la eldonanto :
Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 Laroque Timbaut

INTERNACIA
SOLIDARO
donos
ŝlosilon
por libereco
kaj fino
de
Apartigo

*





KELKAJ ENKONDUKAJ VORTOJ al tiu ĉi 62a (80a) "Laŭte!"

* La frontpaĝa desegnaĵo fontas el poŝtkarto eldonita de "Public Services International" (Internacio de Publikaj Servoj), F 01210 Ferney Voltaire, Francio. La teksto origine estas en la angla, franca, hispana, sveda kaj germana, sed ne en Esperanto. La pk. estas sendenda al S-ro Botha, Sud-Afriko.

* Malgraŭ la stranga titolo de la titolo, vete debatas la kutimaj geĉenleteranoj - al kiuj aldoniĝis amiko Paŭlo, vizitinta la Laŭtejon fine de aŭgusto.

* Sekvas la kutimaj rubrikoj de amikoj Valo, L. Mimó kaj la krucvortoj...

* Kelkaj reagoj pri jam eke aŭ longe debatitaj temoj estas arigitaj en la rubriko "Ĉies voĉo".

* L! gastigas ĉi-foje novelon de Lina Gabrielli (Hagen Hirte vi retrovos en novembro) kaj -nn- kompreneble ne estas tre malproksime...

* Apartan atenton bonvolu dediĉi al la teksto "Ni decidiĝu" de G. Coste. Ĝi efektive estas reinstiga komplemento al la pasintjaraj felietone aperintaj "Ses alvokoj al la homa konscienco" de Asocio por la Protekto kontraŭ la Ionigantaj Radiadoj. Notu, ke pli la hazardo de la enpaĝigo, ol la lerteco (!?) de la tajpanto-balaanto, sekvigas ankaŭ la paĝnumerojn de tiu "Suplemento" al "AL". Notu ankaŭ, ke la nun kompletiga broŝuro AL restas liverebla (nova prezo : 6FF). Nepre legigu ĝin kaj subskribigu la "Alvokojn" al ĉiuj viaj interesigantaj gekonatoj.

*

Male al tio projektita, tiun ĉi numeron prizorgis entute la kutima farsulo sed ne aliaj gelegantoj. Amiko Paŭlo estis akurata ĉe la rendevuo (kun ja laborpreta kunulino) sed devis rezigni pro manko de tempo kaj ĉefe... de aliaj ŝvitemuloj. Ĉu definitiva fiasko? Certe ne. La ĉi-supre aludita farsulo atendas nur venontan okazon - verŝajne ekde marto '86 - por malegoisme bonvenigi aliajn jungotojn dezirantajn kuntreni la ĉaron. Sed pri tio vi eventuale ekscios "siatempe" - kiel aplombe skribis Zamenhof mem, kiu ne timis mem "eksid" sur la Fundamento...
Kribo.

Nekonato: la Zamenhofs Homaranismo

REFERENCOJ

DZ : E. Drezen, Zamenhof, SAT, Leipzig, 1929

LZ G Waringhien, Leteroj de L.L. Zamenhof, 2 vol. SAT. Paris, 1948.

OV J Dietterle, Originala Verkaro de L.L. Zamenhof, F Hirt, Leipzig, 1929

VZ E Privat, Vivo de Zamenhof, unua eldono BEA, London 1920, tria eldono EPC, Rickmansworth, 1946.

WM G. Waringhien, La ideologia dramo de L.L. Zamenhof, prelego en Munkeno 1951, presita en Sennacieca Revuo n° 81, 1953, p. 2.

(la ciferoj indikas la paĝon ; por VZ : ambaŭ eldonoj)

KONSPIRO DE SILENTO.

Okaze oni povas legi en la esperanta literaturo aludon pri la Zamenhofs Homaranismo. Oni almenaŭ scias, ke ĝi ekzistis. Sed ĉu oni bone konas ĝin ?

La destino de Z. ofte estis malagrabla : moko kaj miskomprenoj trafis lin. Pri lia idealisma sistemo, la malsukceso estis speciale malesperiga. Liaj konsilantoj penis silentigi lin dum pluraj jaroj pri tiu temo. Kiam fine li forlasis ĉiun oficialan postenon, por libere esprimi sian privatan kredon ; kiam aperis, la unuan fojon malkaŝe sub lia nomo, la broŝuro de majo 1913, peza konspiro de silento falis sur ĝin.

« La Revuo » de Bourlet, kies ŝildo estis la « konstanta kunlaborado de la aŭtoro de la lingvo Esperanto », unue rifuzis presi la — mallongan — tekston. Ĝi atendis por ĝin recenzi, ĝis februaro 1914, kaj tion faris hezite : « la diskutado pri la esenco de tiuj ĉi deklarioj estas iom malfacila en La Revuo... tamen ni rimarkigas ilian gravecon, kiun ni ne povos ĉiam flankenlasi ». Fakte Bourlet (mortinta en aŭg. 1913) kaj de Ménil flankenlasis la aferon, dum ilia gazeto publikigis en la sama periodo longajn tekstojn pri la penso bahaia (julio, septembro, februaro kaj aprilo 1914), la predikojn hebrean kaj kristanan dum la kongreso de Berno. Iun « Deklaracion pri mondamikigo » bazitan « sur fido al Dio », kaj, ho ve ! eĉ artikolon pri la rasisto Gobineau, de mia instruinto, H. Muffang.

Post la morto de Z. la teĝo de silento daŭre pezas kaj premas. Kompreneble mi ne legis ĉion en Esperantio, sed tre malofte mi povis legi pri homaranismo.

Ekzemploj ne mankas Oni povas verki artikolon pri « Esperantismo, la nova Etiko » (M. Stultard, « Heroldo », 30-7-1939), ne skribante la vorton Unu el la plej kuriozaj instrulibro, la « Nova gramatika libro » de Stamatidis, ne nur gramatika, sed predikanta fratecon, proponanta esp-saluton « Amo », esploranta la konduton de esperantistoj dum milito, ktp. ne konas homaranismon Lanti ankaŭ probable ne bone konis ĝin pri tio ni reparolos. Demidjuk konstatis tiun nescion — aŭ ignoron —

« Kiam oni uzas la nomon de Z. oni uzas ĝin nur por la ideoj de

Z.-majstro, de Z. limigita per sia majstra rolo en la movado, neniam de Z. libera de majstreco, neniam de Z.-homo, homarano ». (*Kvardek jaroj*, 1927, p. 25).

MISKOMPRENOJ.

Pli bedaŭrindaj estas la miskomprenoj. Ankaŭ ili ne mankas.

Tuj mi ataku la plej ĉagrenan kaj nekompreneblan : la difinon de Waringhien, kiu cetere tiel bone analizis la tragedian ideologian vivon de Z. « Teista movado analoga al socinismo » estas tute neakceptebla karakterizo por afero, en kiu teismo estas nur nedeviga akcesoraĵo kaj kies esenca hebreeco tute malpermesas, ke oni ĝin komparu al kristana herezo. Kial ne adopti la difinon de la P.V. ?

Mi diru, ke la duvorta difino de W. Perrenoud (Fundamento de Geonismo) : « hebrea humanismo », estas nekompleta ; oni devus aldoni almenaŭ : « kun daŭraj streboj por elhebreigi sin. »

Miskompreno, la stranga kaj tute neprava hipotezo de la redaktoro de unu el la plej malgrandaj, — sed plej interesaj — gazetoj, pri la rolo de la lingvo jida en la sistemo de Z. (F. Banham, « Heroldo », 16-12-1956) !

Miskompreno, la artikolo de F. Roose : « Dro L.L. Zamenhof kaj la religio » (« Heroldo », 15-4-1947), kiu tro facile emus aneksi lin al kristanismo. Oni malfidu plurajn citaĵojn en tiu teksto, — des pli oni forpuŝu ĝian duan eldonon (« Flandra Esp-isto », dec. 1956), en kiu ŝanĝiĝis kelkaj vortoj, tie kaj tie, sed ĉefe en la citaĵoj !

Eĉ en la plej lastaj movadoj, kiuj pli malpli parenas kun la idealoj zamenhofaj kaj adoptis la internacian lingvon, oni devas bedaŭri la samajn nesciojn (kiel en *Egio de Bonvolo* kaj *Universala Religio*), la samajn nekompletajn informojn.

Jus eldonita libreto de R. Eichholz, sub la titolo « Unitarismo — Realigita Homaranismo », montras, ke la aŭtoro tre probable ĉerpis sian konon pri homaranismo nur el la biografio de Privat (VZ), cetere tre bona. Tio igas lin citi, kaj diskuti, tri vortojn : « por ĉiam fiksitaj », kiuj troviĝis en projekto de Z., sed malaperis el la definitiva teksto !

DOKUMENTOJ.

Kompreneble oni ne rajtas riproĉi, ke aŭtoroj ne konis dokumentojn ankoraŭ ne publikigitajn. Tiel klariĝas kelkaj mankoj en Dietterle ; tial oni ne akceptu la indikojn de Privat pri la sinteno de Z. al cionismo.

La plej gravan kontribuon al la kompreno de la penso de Z. alportis la leteroj de Z. kolektitaj de Waringhien (LZ) ; ili aldonas almenaŭ 9 leterojn al la tekstoj de O.V. Pli sube mi donos ilian liston.

Kiu volas havi ideon pri la homaranismo, devas legi la biografion de Privat (VZ), kiu en pluraj ĉapitroj studas la « idealistan profeton », la « homaranon », la « etikan pensulon ». Privat konkludas, ke ni havas devon : « konigi tutan lian proponon al homaro ».

Oni legu la prelegon de Waringhien (WM), kiu pentras la senĉesan internan bataladon, al kiu Z. ofte aludis ; kiu mallimis prezenti al la neŭtrala kongreso de 1951 nian Lanti kun lia sennaciismo, kiel la « veran idean heredinton de Z. »

Ankaŭ Drezen studis la « Zamenhofan mondkoncepton » (DZ). Kompreneble, li mallaŭdas, ke Z. neglektis la ekonomiajn kaŭzojn, eĉ pri temoj, kie oni rajtas ne agnoski ilin : « la lingvo mem estas produkto de certa socio, de certaj formoj de mastrumado kaj de socia produktado » (mi dirus *iu* anstataŭ *certa*). Sed lia prezento entute estas bona, entute simpatia al Z. ; ĝi meritas la legadon.

Kiu volos pli detale esplori kaj kompari, kompreni la evoluon de la Z-aj ideoj, tiu rigardu en la kronologia vico al :

a) La letero al Kofman, majo 1901 (OV 322), kiu donas indikojn pri la unua ruslingva broŝuro, aperinta sub la pseŭdomino « Homo sum ». (La noto de Dietterle estas plurparte neĝusta).

b) La letero al Michaux, februaro 1905 (LZ 1, 105), multe pli detala ol la konata letero al Borovko, speciale pri nia temo.

c) La letero al Javal, septembro 1905 (LZ 1, 199), tre grava, ia testamento filozofia de Z., por ke lia ideo « ne tute pereu » en kazo de lia morto ; dufoje en tiu letero Z. petas, ke oni volu ĝin konservi, ne nur en la fino, sed ankaŭ sur la unua paĝo (aldono vertikala kiu eskapis la atenton de la kolektinto : « Mi petas Vin, volu konservi tiun ĉi mian leteron, ĉar povas esti, ke ĝi estos iam utila por la esperantistoj »). (1).

ĉ) La letero al Michaux, oktobro 1905 (LZ 1, 214).

d) La artikolo en « Ruslanda Esp-isto », januaro 1906, samtempe presita en la dua broŝuro (OV 313), kiu aperis en ambaŭ lingvoj, rusa kaj esp-o.

e) La artikolo de februaro 1906 (OV 321) : aldonoj.

f) La tria broŝuro, marto 1906 (OV 324), *nur en esp-o* (Dietterle eraras), kun apero de la nova nomo Homaranismo anstataŭ Hilelismo.

g) La artikolo de majo 1906 (OV 329), kiu estas respondo al katolika pastro Dambrauskas/Dombrovski, sub la pseŭdonimo « Homarano » ; tre kurioza pro la argumentoj tute ne komplezaj, absolute ne favoraj konvinki religiulon, eĉ blasfemaj por li : la grandaj libroj estas « verkoj ne de Dio, sed de homoj », la « senduba pereu » de la religioj...

ĝ) La nefermita letero al de Beaufront, junio 1906 (OV 336), sub la nomo de Naumann, komisie de iu « Unua grupo homarana » (ĉu nur fikcia ? komparu LZ 264 pri la varsovianoj).

h) La letero al Javal, majo 1906 (LZ 1, 263).

ĥ) Al la sama, junio 1906 (LZ 1, 269).

i) Al la sama, aŭgusto 1906 (LZ 1, 281).

j) La letero al Bourlet, januaro 1913 (LZ 2, 317) : projekto pri kongreso de neŭtrala religio.

j) Al la sama, februaro 1913 (LZ 2, 324).

k) La letero al Sébert, marto 1913 (LZ 2, 326).

l) La letero al Bourlet, aprilo 1913 (LZ 2, 327) : projekto pri la kvara broŝuro.

(1) Mi devas ĉi tie danki eks-esperantiston de Guesnet, prezidanton de l'Interlingue Union, kiu, meze de necedema polemiko, bonvolis komuniki al mi la originalon de la leteroj c) kaj h), alian leteron (LZ n° 210) kaj ekzempleron de la broŝuroj d) kaj f), kiujn li heredis de Javal ; la dosiero entenis ankaŭ malnetan francan tradukon de la letero c), probable faritan de la sekretario de Javal, — ĉu en rilato kun la disvastigo inter parizaj hebreej, aludita de LZ 210 ?

m) La kvara broŝuro, junio 1913 (OV 338), kun la indikoj : « de Dro L.L. Zamenhof, Varsovio (Pollando) Ruslando » sur la unua paĝo, « de Dro L.L. Zamenhof, Aŭtoro de la Lingvo Esperanto » sur la kovrilo.

Evidente tiu listo ne estas elĉerpa. En multaj aliaj lokoj Z. aludis siajn homaranajn idealojn. La tuta sinsekvo de la kongresparoladoj entenas notindaĵojn. Cetere mia celo ne estas complete pritrakti la temon. Mi ne intencas refari la bonajn eksponojn, kiujn mi supre rekomendis. Mi nur deziras kompletigi kaj precizigi ilin pri kelkaj punktoj, — ankaŭ plurfoje meti demandosignojn.

Unue mi skizu la historion de homaranismo, por pli bone orientiĝi sur la tereno, kie staras la gvidsignoj ĵus plantitaj.

HISTORIO DE HOMARANISMO.

Homara amo kaj ties prozelitismo estas iu ruĝa fadeno — pli verestrio —, kiu strekas la tutan varpon de la vivo de Z., vivo teksita de malfaciloj kaj de esperoj.

Jam la unua libro de 1887 profetas : « la popoloj interproksimiĝos kiel unu familio », la dua (1888) proklamas « profundan kredon je l'homaro » : « Vivu l'homaro, vivu la frateco de l'popoloj... ! »

Dum la unuaj vivjaroj de la lingvo internacia, Z. ankoraŭ restas sub la influo de plurjaraj laboroj pri juda lingvo kaj cionismo. La senĉesa lukto inter « la juda patriotismo kaj la homeca universalismo » (WM) epizodas per decida batalo en 1897, kiam li rifuzas aliĝi al la cionisma movado de Herzl. Li elpaŝas al Hilelismo ; tia estis la unua nomo de **Homaranismo**.

La rusa broŝuro estas eldonata en 1901 ; « bato de l'sorto » : la eldonisto bankrotas, fakte neniu ekzemplero eliras al la publiko ! (LZ 1, 205). Ĝi eksplicite titoliĝis : « Hilelismo kiel solvo de la hebrea demando. » En tiu periodo Z. hezitis (6 jarojn ! LZ 205) pri la *aplikmaniero* de hilelismo : ĉu unue al la hebreoj, al kiuj ĝi speciale taŭgus, ĉu tuj al ĉiuj popoloj ?

La Bulonja kongreso de 1905 estas la decida vojturno. Jam de la anonco li pripensas himnon por la kongreso, kiu « komenciĝos kiel solena preĝo (sed preĝo pure filozofia kaj neŭtrale-homa...) ». Sed lia verko ne kontentigas lin ; li petas, ke Michaux ne publikigu ĝin (LZ 1, 96, 98) ; tamen ĝi fariĝos la fama « Preĝo sub la verda standardo », post anstataŭo en tri strofoj de « Dio » per la « homaro » (LZ 1, 96). Waringhien rakontas (LZ 1, 175) la miregon, la konsternon de la francaj gvidantoj, ekkoni en Z. « judan profeton ! » ; ilian insiston, por ke li ne legu la Preĝon : en tiuepoka Francio la politikaj pasioj flagris pri la laikigo de la ŝtato ; la kontraŭklerikala agitado atingis paroksismon. Sed li ne diras, kiam Z. faris la tekstoŝanĝojn, ĉu en Bulonjo lastmomente ? ĉu antaŭ ol alveni ?

La religia entuziasmo de la kongreso pravigas Z-on, kaj instigas lin *plupaŝi*. Li konsultas samrasanon Javal. Sed li ankoraŭ hezitas pri la taktilo, pri la dato (LZ 1, 205, 214). La gravaj okazaĵoj en Rusio igas lin ne atendi plu (LZ 1, 233) : kiel provan balonon (LZ 2, 327), li eldonas anonime la duan broŝuron, kaj preskaŭ tuj la trian, sub respektivaj nomoj Hilelismo kaj Homaranismo. (La subtitolon, kiun indikas OV 324 kaj LZ 1, 256 mi vane serĉis sur la ekzemplero, kiun mi vidis). Li dezirus ankaŭ sondi la opinion de francaj gazetoj (LZ 1, 264). Intertempe eĥas esperantistaj reagoj,

ne tre favoraj : jen loko de la epizodoj Dombrovski kaj Beaufront ; tiu ĉi akre mokis la « novan teozofion » kaj proponis « ritojn... en verdaj roboj surŝutitaj per oraj aŭ arĝentaj steloj ». Rezulto estas detalaj ŝanĝoj farotaj de Z. en la formo de la « Dogmoj » (LZ 1, 270).

Pogromo en Bjelostoko denove instigas lin al plua paŝo : li intencas prezenti sian Homaranismon al la Geneva kongreso, kiu okazos unu monaton poste. Sed post interkonsiliĝo kun Javal kaj Sébert (LZ 1, 279) li rezignas ; lia kongresa parolado indigne krias lian abomenon al tro praktika kaj senideala esperanto. Cetere la kongreso severe reglamentas la neŭtralecon de la kongresoj : el tiu deklaro, sennaciistoj zorge notu la agnoskon, « ke la ĝenerala alpreno de helpa lingvo internacia havos, eble post longa tempo, gravajn kaj tre fruktoportajn konsekvencojn por la vivo de la popoloj, en la politika, religia kaj sociala kampoj ».

En Kembrigo, 1907, Z. reparolas pri sia koncepto de tiu neŭtraleco (OV 379). Sed tiam lingvaj kaj administraj zorgoj kaplas lian atenton. Kiam li povas reveni al sia dorlotata temo, li decidas forlasi ĉiun oficialan postenon, por havi la liberon pritrakti « tute privatajn ideojn aŭ frenezajojn de Z. ». (OV 410).

En Krakovo, 1912, li adiaŭas la honorojn. Li imagas novan agadformon : « Kongreso de neŭtrala religio », kiun oni kunvokos en Parizo samtempe kun la kongreso 1914a. Egaj iluzioj : li esperas, — ne, li estas « plene konvinkita » —, pri « grandega sukceso », « granda entuziasmo » (LZ 2, 318). Javal mortis jam en 1907. Li sin turnas al Bourlet, organizonto de la Pariza kongreso. La respondo estas glacia duŝo.

Tiam Z. ekpensas pri nova eldono de la broŝuro ; li sendas projekton al Bourlet kaj serĉas eldoniston : Ĉu Hachette ? Ĉu *La Revuo* ne publikigos ĝin, senpage ? Bourlet ne respondas.

Fine la kvara broŝuro aperas en Madrido, dank'al la gazeto « Homaro », kiun la Tutmonda Jarlibro por 1913-14 indikas kiel organon de la Esp. Framasona Asocio, kaj ne plu anonime.

En julio 1913, Z. subite ekscias, ke okazos baldaŭ religia kongreso en Parizo. Tuj, la hodiaŭon mem, li intencas prepari memuaron (LZ 2, 338) kaj skribas al Bourlet. Sed sperto tro ofte trompis esperojn : la morgaŭon li rezignas.

De la komenco, tre demokrate Z. intencis konfidi pli precizan redakton de sia idearo al la unua kongreso de la hilelistoj/homaranoj (OV 321, enkonduko de la Redakcio de « Homaro » al la kvara broŝuro). La organizantoj de la Pariza kongreso forpuŝas la homaranojn (VZ 180/119) ; la programo anoncas ilin eĉ ne unulinie, por tute modesta faka kunveno, sendetale, post aliaj 21 larĝe detalataj fakaj « kongresoj ». Z. obstine klopodas por kongreseto en Berno (OV 577)... Oni bone scias, kio okazis en aŭgusto 1914, anstataŭ frataj kunvenoj...

La lasta konata akto de tiu tutviva senĉesa baraktado kontraŭ malhelpoj kaj misakceptoj estas la sendo de nova teksto al Maria Hankel, en septembro 1915, dum la tagoj de batalo en Polio kaj de fremda okupado (OV 567). Ĉu iu havas informojn pri tiu lasta provo ?

HEBREECO.

Cio fontas el la hebreeco de Zamenhof.

Hebreeco, kiun la gvidantoj de la movado preferis kaŝi (LZ 1, 210), kiun li mem fiere deklaris : « mi estas hebreo... hebreo el la ghetto... mia

hebreeco estis la ĉefa kaŭzo, kial mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo — al la revo pri la unuigo de la homaro » (LZ 1, 107).

Oni ofte priskribis la etoson de malamo, malkompreno kaj apartigo, en kiu la juna Z. kreskis. La eĥo de la pogromoj pli ol unu fojon aŭdiĝas en liaj kongresaj paroladoj. Sed eble oni ne sufiĉe insistis pri la propraj ecoj de la judaj komunumoj, kiuj aldoniĝis al la persona karaktero de Z. kaj igis lin vastigi sian horizonton, de la judejo al la urbo, de la landeto al la granda regno, kaj fine trans landlimoj kaj trans ĉiaj limoj.

Z. sian tutan vivon estis *vastiganto*.

Stojan (kiu pledas, ke la naskiĝloko de esperanto klarigas multon, ke oni ne sufiĉe konsideras nian lingvon el orienta vidpunkto) prave atentigas pri tia juda medio, kia estis la bjelostoka : « Ciu el ili, sidante en plej obskura urbeto, tamen konsciis, ke liaj kunfratoj estas dissemataj tra la tuta mondo. Ili paciencis, interne subtenataj per ia triba fiero, per ia espero pri venonta spirita regno » (« Deveno kaj vivo... », p. 23).

La « triba fiero » impulsis la laborojn de Z. pri la jida lingvo, dum 2 jaroj (LZ 1, 109) aŭ 3 (Lingvo-Libro, 1937), antaŭ 1879. La traktajo aperis en jida revuo nur en 1909.

La triba fiero igis lin cionista aktivulo, eĉ gvidanto, dum la periodo 1881-1887 (detala studo en « Nica literatura revuo », 1958, p. 127 kaj 165). Tiam li uzis sian unuan pseŭdonimon (rusortografia anagramo : Gamze-fon) ; li poste plurfoje pseŭdonimis !

La « espero pri spirita venonta regno » estis pli ol unufoje priskribata de Z. En la antaŭkongresa letero al Michaux li aludas la « historian mision » de la hebrea popolo, kun rimarkinda difino de la senkompromisa juda monoteismo : « unuigo de la nacioj en la celado al « unu Dio », t. e. unuj idealoj por la tuta homaro » (LZ 1, 106).

Paŝo unua al universalismo estas la konstruo de la hilelismo : ĝi celas ja « unuigon de la homaro ». Sed la unua formo de tiu doktrino, kiun Z. dum jaroj ofte ŝanĝis kaj reŝanĝadis (108) restas tre hebreeca. Ĝi havas ĉefe religian fundamenton ; ĝi penas eligi la esencan leĝon de ĉiuj religioj : « Agu kun aliaj, kiel vi volas, ke oni agu kun vi » kaj atribuas tiun sentencon, pli malpli prave, nur al rabeno Hillel, pretendante ke ĝi troviĝas « en formo konforme esprimita nek ĉe Kristo, nek ĉe Mozeo, nek ĉe iu alia » (OV 331). Ĝi volas krei neŭtralan popolon, sed konceptas ĝin en grupo etnologie homogena, en formo de *sekto*, kiu « povas esti nur... la popolo hebrea » (LZ, 1, 204).

Pluaj paŝoj sur la vojo al elhebrego estas : plano pri sekcio de diverspopolaj esperantistoj-hilelistoj (205), forigo de la titolo profite al « Homanismo » (« homarano » en la lingvo esperanto signifas « membro de la homa familio » », OV 321).

Karakteriza de la evoluo estas ankaŭ la grupo, en kiu Z. mem sin alkalkulas. 1905 : « mi nomas min Ruslanda hebrea » (LZ 1, 115). 1912 : « Mi estas nek polo, nek ruso, nek hebrea, sed mi estas partiano de homaranismo » (letero al la LKK de Krakova kongreso, publikigita en la Bulteno de A. E. Pollando, 5-1956). 1914 : « mi estas homarano » (OV 344) kaj li rifuzas partopreni fondon de Tutmonda Esp-ista Hebrea Ligo. Pro opozicio al « nacionalismo ».

Tiu konstanta strebo por transcendi el la sekto kaj atingi universalon, videbla eĉ en malgrandaj detaloj (al la hebreaĵoj de Javal, kiun

tamen li ĝojis ekkoni samrasano : LZ 1, 167, li ŝajne ne respondas : LZ 1, 232), ŝajnis al mi neprobabla regreson al cionismo en la jaroj 1914-1916, konjektitan de iuj pro la eventoj.

GENTO KAJ LINGVO.

La bjelostokaj cirkonstancoj tiel profunde gravuriĝis en la junan animon de Z., ke ĉiam restas iom da hebreeco en liaj plej universalemaj verkoj, sub formo de konstanta referenco al gentlingvaj komunumoj. Tiu vera obsedo pri gento kaj lingvo igis lin trograndigi la gravon de la genta kaj lingva problemoj (DZ 10).

Pri la prilingvaj zorgoj de Z. la esperantistoj estas ĝenerale sufiĉe informitaj. Mi tamen atentigu pri du deklaroj : unu, kiu povus servi kiel moto al « Bulteno Gepatra » : « Lingvo internacia fortiĝos por ĉiam nur, en tia okazo, se ekzistas ia grupo da homoj, kiu akceptus ĝin kiel sian lingvon familian, heredan » ; la dua, el la sama paĝo, multe pli drasta ol ĉiuj postaj sennaciistaj asertoj : « kiel la hilelismo ne povos ekzisti sen lingvo neŭtrala, tiel same la ideo de lingvo neŭtrala *neniam povos vere efektiviĝi sen hilelismo* » (OV 323).

En la sinsekvaj tekstoj de la Deklaracioj pri Hilelismo/Homanismo, oni ankaŭ notu la zorgegajn precizigajn difinojn pri lingvo familia, lingvo nacia, lingvo genta, lingvo gepatra, lingvo persona, kaj fine lingvo *neŭtrale-homa*.

Neŭtrale-homa ! Tiu epiteto tiom ofte revenas sub la plumo de Z., ke ĝi povus esti la unuvorta resumo de lia doktrino.

Tiu doktrino rebrilas en du verkoj, kiuj koncernas ne la homaranismon, sed proksime parenas ĝin : la « Memuaro por la Kongreso de Rasoj », 1911, kaj la « Alvoko al la Diplomatoj », 1915. En ili Z. reproduktas sian idearon pri la genta problemoj : « Ciu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento » (OV 317 kaj 340). Li sentime eĉ aldonas : « La reciproka batalado inter la diversaj homaj rasoj kaj gentoj estas la plej granda malfeliĉo de la homaro » (OV 345) ; « la ĉefa kaŭzo de la militoj : ... la regado de unuj gentoj super aliaj gentoj », (OV 357).

Foje Z. estis ne tute klarvida... Sur tia genta tereno la plej belan ekzemplon de blindeco li donis en Vaŝingtono, 1910, emfaze salutante Usonon, « lando de libereco, lando de estonteco... regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj floj... » (OV 393), kvazaŭ ne ekzistus negroj, linĉoj, ktp.



La samtempuloj de Z. malfacile komprenis lian vidpunkton pri la « abomeninda genta ŝovinismo » (VZ 179/118). En niaj okcidentaj landoj foris tiaj demandoj. Nun nia favora epoko, en kiu oni devis krei la neologismon « genocido », kaj kiu revivigis la praaajn radikalajn procedojn por unuiĝi teritoriojn, ebligas al ni, pli simpatie rigardi al la homamaj esploroj de la bjelostokano.

NEŬTRALA RELIGIO.

Du mondmilitoj cetere montris al ni rekreskojn de mistikismo kaj de religia sento; malvarma milito kaj teruraj danĝeroj damoklese minacantaj la homaron povas nur plu favori tiun renaskon. Sed en la « facilaj » jaroj de la unua deko 1900, kaj precipe ĉe la skeptikaj francaj intelektuloj kiuj tiam gvidis la esp-istan movadon, la etendo de la Z-a doktrino al neŭtrala religio aperis preskaŭ frenezajo.

Ni retrovas ĉi tie la « gentreligiajn komunumojn » (oni ja scias, ke, fakte, troviĝas en la judaj komunumoj ĉiuj gradoj de kredo, de la plej pia ĝis la nura tradicia indiferenta ĉeesto).

La principoj de Z. baziĝas sur postulatoj, kiuj vere estas nur postulatoj: religio disigas pli ol lingvo (LZ 2, 320); « la religia unuiĝo de la popoloj jam de longe komenciĝis per si mem »; « la unuiĝo religia estas forte ligita kun la unuiĝo lingva »; « ju pli la homoj komunikigados sur neŭtrale-lingva fundamento..., des pli rapide ili ankaŭ en rilato religia interasimiliĝos » (OV 352).

En tiu parto de sia idearo, kiu probable por li estas la krono de la tuta verko, Z. konceptis la plej naivajn iluziojn: ekz. ke li povos simple formuli la sistemon « en unu malgranda artikolo » (LZ 1, 203); aŭ « Se Kristo kaj la aliaj grandaj instruintoj de la homaro nun vivus kune, ili certe facile interkonsentus inter si » (OV 330). Al la kredantoj, kiel ni jam vidis pri la letero al Dombrovski, li senĝene diras malagrablajon: « Ĉiuj ekzistantaj religioj parolas pri kunfandiĝo de la homaro, ne sole neniu el ili donis ian rimedon, por tion ĉi atingi, sed kontraŭe, ĉiu el ili rekte malhelpas tiun ĉi kunfandiĝon... » (OV 330). Al senreligiuloj li proponas, por ligi ilin, eniri en « spiritan azilon...: alian religian komunumon »! (LZ 2, 322).

Oni do ne miras, ke Z. postlasis multon ĉe la dornoj de la vojo. Ambaŭ kredantoj kaj nekredantoj skuis lian konstruaĵon. Mi prenu el ĉi tiu diservo argumentojn de la unuaj: « La majstro... revis... uniformigi ĉiujn konfesojn en unu komuna religio. Li forĝesis tamen, ke la homo neniam sukcesos, el diversaj inter si mem kontraŭdirantaj religioj fabrikadi unu komunan; li forĝesis, ke homo ne rajtas fari religion, ĉar la religio ne povas esti homa faritaĵo, ĝi devas esti Dia devenaĵo. Nur Dio rajtas preskribi al la homoj, kiel ili servu Dion, ktp » (« Heroldo », 26-12-1937) (1).

La religian flankon de sia sistemo Z. do devis ŝanĝi: multe evoluis la redakto de liaj principoj, kiujn li strange unue nomis « dogmoj » de hilelismo.

Lia granda ideo estis disigi la ordonojn de la religioj inter du grandaj kategorioj: la ordonoj de Dio mem, enskribitaj « en la koron de ĉiu homo sub la formo de konscienco », kiujn oni povas redukti al la « ora regulo »,

la principo de Hillel: « Agu kun aliaj, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi »; kaj, dua kategorio, ĉio alia, nur ordonoj de homoj, kiuj do povas ŝanĝi kaj kunfandiĝi.

Evidente la eklezioj ne emas dispecigi siajn instruojn. La herezan prezenton Z. penis modifi. La « ordonoj de homoj », difinitaj en unua teksto kiel « grupe-tradiciaj legendoj kaj moroj » (LZ 1, 215) iĝas pli nuance « aldonoj, kiujn ĉiu homo, konforme al sia kredo, havas la rajton rigardi aŭ kiel devigajn por li dirojn de Dio, aŭ kiel komentariojn, kiujn miksite kun legendoj donis al ni diversgentaj grandaj instruintoj de la homaro, kaj kiel morojn... » (OV 342).

La unuaj redaktoj pretendis ne krei novan religion, ne postuli ke homo forjetu sian religion, sed starigi neŭtralan ponton, pacigan ponton inter la diversaj religioj, ne detruante ilin. Fakte Z. starigis duan religion por ĉiu homo (LZ 1, 201), kun detala programo pri taktiko: fakmovado en la esp-a movado; pri organizo: centro en Svisio, temploj; pri kulto: diservoj, ja neŭtralaj...

La lasta formo de homaranismo estas tute alio. Li rezignis konvinki la kredantojn, kiuj cetere tute ne suferas pro la dividiteco de la homaro (LZ 2, 320). Li sin turnas nur al « homoj libere pensantaj » (OV 334).

Speciala konsidero al la « tradicia religio », en kiu oni pli malpli indiferece restas, donas al Z. la okazon mallaŭdi la hipokriton. En tia kazo li konsilas sin nomi oficiale « liberkreda » ano de tiu aŭ alia religio. Tiu zorgo pri oficiala agnosko estas komprenebla en ŝtato, kie oni devas konfesi sian eklezion, sed tute ne en laikaj landoj.

Al tiuj liberpensantaj homoj, Z. volas doni, en maniero « reala kaj praktika », neŭtralan « eksteran kadron », en la formo de « organizita sengenta kaj sendoktrina komunumo de liberkredanoj ». Nur neprecizan programon li nun asignas al tiuj komunumoj: « neŭtralan nomon, ...komunumajn aranĝojn, ...nedevegajn neŭtrale-homajn festojn kaj morojn, neŭtrale-homan kalendaron, ktp » (OV 343).

La koncepto de Z. pri liberkreduloj aspektas al ni tute stranga. Li daŭre imagas ilin kiel nostalgiaj al religio, el kiu ili « defalis »; « multaj el ili sentas sin tre malfeliĉaj »; « ili volus iri en preĝejon » (OV 335); ili kvazaŭ « pendas en la aero », fariĝas eĉ « nefidindaj por la plimulto da homoj » (LZ 2, 321). « Ilia vivo fariĝas tro proza »; « ili volus alporti kelkan poezian ĉarmon en la vivon de siaj infanoj »...

La problemoj pri la gefiloj de liberkredulo, eĉ pri la « paco de lia familio » (LZ 2, 333), daŭre sieĝis lin: « abstrakta senreligieco ne povas esti heredata », « filoj aŭ nepoj de senreligiulo ordinare revenas al ia el la ekzistantaj religioj »; « infano bezonas impresojn kaj senteblan eksterajn... tiun feliĉon, tiun varmon, kiun al aliaj infanoj donas la preĝejo » (VZ 175/116).

Tiujn zorgojn klarigi oni povos nur per ĝisfunda studo de la personaj spertoj de Z. Ĉu influis la propra infanaĝo apud ateista patro? Ĉu la eduko de propraj gefiloj? Kion oni devas indukti de la aludo al la filino Lidja ĉe Privat (VZ 176/116)?

PERSONA KREDO DE ZAMENHOF.

Kia cetere estis la persona kredo de Z.? Kvankam li prezentis homaranismon kiel sian politika-religian kredon, oni ne povas precize konkludi

(1) Kp ankaŭ kritikon de homaranismo en « Dia Regno », 10.1958, p. 341

el la Deklaracioj, kies teksto plurfoje prezentas elekteblon, ekz. : « religio aŭ religi-anstataŭanta sistemo » (OV 342). Plie iuj temoj estas en ili tute prisilentataj : ekz. pri animo kaj senmorteco.

La « vortoj de lasta konfeso » (VZ 198/129) postlasas multajn nekla-
raĵojn. « Miaj tiamaj pensoj pri Dio kaj pri senmorteco preskaŭ tute ne ŝanĝiĝis »... sed li ne esprimis ilin.

La diversaj difinoj de la koncepto Dio ŝanĝiĝis sub lia plumo laŭ la epokoj. Sed oni povas malfacile konkludi el ili. En la epoko de la « Preĝo », ili ja tekstas : « nekomprenebla plej alta Forto kiu regas la mondon », dum la teksto el 1913 ne plu citas regadon : « la plej altan nekompreneblan Forton, kiu estas la kaŭzo de la kaŭzoj en la mondo materia kaj morala »... kaj aldonas : « mi povas nomi per la nomo Dio aŭ per alia nomo ». Sed en la sama jaro oni trovas la redakton : « Mi konscias, ke la mondon regas ia alta ktp », redakton eĉ pli providencisman ol la unuaj ! Mi jam citis la ekstreman klarigon : « Unu Dio, t. e. unuj idealoj por la homaro » ; ĝi datiĝas de 1905 !

Cu oni devas atenti la zorgon de Z., ne identigi libercredon kun ateismo ? Ne ; li volas malfermi sian templon al ĉiuj. Sed kion opinii pri tiu kurioza peto al Bourlet : « Eble Vi scias pri la ekzistado de la liberpenso komunumo, kiu ne havas la du diritajn mankojn ? » (t. e. manko de konkretaĵoj, ligo al ateismo). « Al tia komunumo mi tre volonte aliĝus » (LZ 2, 326) ?

La lastaj vortoj de la « Lasta konfeso » : « ...ke io min gardas al alta celo... » jam estis interpretataj kiel kredo al senmorteco de animo. Edmond Privat, kiun mi konsultis, bonvolis respondi : « Kredo je la senmorteco de la eterna, ne-individua, ne-persona elemento spirita en la homo, lia partopreno en la krea spirito kaj lia solidareco kun la estintaj kaj estontaj kreitaĵoj. Ĝi klarigas frazojn kiel : " Mi ne vidos tion dum mia vivo, sed pli poste per la okuloj de la spirito " (konversacio) ».

Kaj pri la kredo de Z., kiun li cetere similigas al tiu de Emerson kaj de Carlyle, Privat skribis al mi : « Laŭ mia scio kaj memoro, Z. estis liberkredulo kiel Gandhi. Ambaŭ ne kredis je persona Dio, sed je krea Spirito kaj inspira Forto, kiu instigis ilin labori por harmonio inter homoj diversgentaj. Tio estas la senco de la « preĝo sub la verda standardo », kiu tre interesis Gandhi. Li pli precize ol Z. difinis sian Dion : Vero en la senco de la plena realo, kiu entenas ĉiujn kreitaĵojn kaj la kreaĵon ».

RELIGI RELIGIOJN

Kiu ajn estis la profunda kredo de Z. (kaj mi emas opinii, ke ĝi oscilis), gravas io, tio estas lia celo kaj la mesaĝo, kiun li postlasis.

Z. bone sciis, ke lia sinkretisma ideo ne estas nova : « pri nia ideo ĉiam revis kaj revas la plej bonaj homoj en ĉiuj tempoj kaj en ĉiuj lokoj de la tero... Sed la diferenco inter ili kaj ni estas tio, ke ili parolas kaj revas pri la frateco de la homaro kaj ni celas ĝin praktike efektiviĝi ; ĉiu vera religiulo, humanisto aŭ framasono, kiu el la anaro de la parolantoj kaj revantoj transiras al la anaro de la efektivigantoj, fariĝas per tio " homarano " » (OV 332). Plia grandanima iluzio : ke li efektivigos fratecon kiel li jam realigis lingvon !

Estus tie loko, per ekzameni la parencajn klopodojn por pli malpli religi religiojn. Sed tio bezonus plian longan ĉapitron. Kaj estas tre

dubinde, ĉu Z., ege okupita per siaj lingvaj laboroj — krom la profesiaj, — havis tempon por ilin detale studi. Ili tre diversas, revelacion agnoskas aŭ ne, starigas veran kulton aŭ nuran meditadon, ktp.

Se rigardi nur ĝis la lastaj cent jaroj, mi nur aludu la pozitivismon kaj la religion pri Homaro, de Aŭgusto Comte (kun verda flago ! kaj ankoraŭ adeptoj en Brazilio) ; Bahaismon ; Tolstojismon ; unitarismon, kiu heredis plurajn kristanajn herezojn kaj speciale socinismojn ; Oomoton ; brazilan Legion de Bonvolo ; argentinan Universalan Religion ; en la kadro kristana : la Konsilantaron ekumenan de la eklezioj ; pli larĝan Asocion por la liberala kristanismo kaj la religia libero, kiu kunvenis en aŭgusto 1958 en Ĉikago. Kaj la listo neniam finiĝos : ĉiutage naskiĝas novaj profetoj... jen ekz. tiu propono, ke kunfandiĝu budaismo kaj spiritismo (Oomoto, 11-1957, p. 164) !

Specialan mencion meritas Unitarismo, pro la libreto de Eichholz, kiun mi jam citis, kaj la pretendo, ke ĝi realigis la Z-an homaranismon. Efektive en tiu antologieto troviĝas predikoj kontraŭ « paroliismo » kaj dogmismo kaj diversaj prelegoj tre parencaj al la ideo de Z. La unitarismo (tiu titolo ja ne signifas unuigismon pri la homaro, sed kontraŭon al la kristana doktrino pri dia triunuco) « evoluis de la kristana religio ». Ĝiaj komunumoj estas tre aŭtonomaj ; ŝajne ĉiuj ne eliris ĝis la sama grado el la kristanismo, kaj iliaj doktrinoj diversas. Ja la monata revuo ŝanĝis sian nomon de « Kristana Registro » al « Unitara Registro » ; jam en 1920 konferenco deklaris : « Nia interpretado delonge estas trans kristanismo ». Sed ĉu unitarismo partoprenas en la Ekumena konsilantaro de la eklezioj (1) ? La plej liberala artikolo el la libreto aludita tre laŭdinde emas al homeco, al tutmondeco.

Sed ĉiuj tiuj movadoj restas sur religia tereno.

Z. plugis pli larĝan kampon.

HOMARANISMO ESTAS TUTO.

Oni ne forgesu, ke la Z-a homaranismo estas kompleta sistemo lingva, politika, filozofia, religia. Tio estas samtempe forto kaj malforto. Malforto, ĉar multaj flankoj estas atakeblaj, kaj speciale la religia flanko estis pafcelo por multaj. Forto, ĉar oni ne povas disigi la diversajn aspektojn de la homaj socioj.

Tie mi ankaŭ remenciu alian novan movadon, « Geonismo », de William Perrenoud, kiu evidente multe ĉerpis el la ideo de Z. Ĝi tute eskapas la religiajn problemojn (mencianta nur, ke estas « ekstreme interese informiĝi... kiel la diversaj religioj... konsideras la homan destinton »).

Malgraŭ la laikigo de la modernaj ŝtatoj, malgraŭ la kresko de indifera religia (ĉu Z. ne tro taksis ĝin ? : « Grandega multo da homoj », LZ 2, 320), la religiaj faktoroj ankoraŭ efektivas. Sociologiaj enketoj montris kazojn, kie la laŭkonfesia divido de loĝantaro pli videblas ol la sociaj klasoj kaj la malsamaj ekonomiaj interesoj. Plej tipa ekzemplo de graveco de religiaj diversoj estas la kreo de geografie strangega Pakistano.

Z. do pravis, ne neglektante tiun aspekton de la realo.

(1) Jes, kaj « Dia Regno » ekskomunikas ĝin ! (12.1958, p. 351)

Ja oni riproĉis, ke li ne atentis alian aspekton : la ekonomian, kun la socia problemoj pri klasdiferencoj (DZ 13).

Pri tio oni konsideru, ke lia medio familia ne liveris spertoteron. Kvankam ne riĉa, ĝi estis etburĝa. La patro, instruisto pri lingvoj kaj cara cenzuristo, edukis ok gefilojn — tre laboreme — el kiuj iĝis 3 kuracistoj kaj unu farmaciisto. Nek en gimnazio, nek en universitato la juna Z. povis renkonti filojn de la laborista klaso. Dum la liberalprofesia praktikado, li kompatis kaj helpis multajn mizerojn kaj mem spertis tre mizerajn periodojn. Sed nur iom post iom li konsciis pri la problemoj specialaj al la dungitoj.

La unua esperantistaro ankaŭ ne povis lin instrui pri la laborista klaso. Sed la socialaj fermentadoj, la rusa ribelo de 1905 malfermis liajn okulojn. En 1910 li salutas tre simpatie la kreon de laborista esp-gazeto en Germanio : « *Eble por neniu en la mondo nia demokrata lingvo havas tian gravecon, kiel por la laboristoj, kaj mi esperas, ke pli aŭ malpli frue la laboristaro estos la plej forta apogo de nia afero. La laboristoj ne sole spertos la utilon de esp-o, sed ili ankaŭ pli ol aliaj sentos la esencon kaj ideon de la esp-ismo* » (LZ 2, 263) — Teksto kiun ni neniam tro citos kaj recitos ! De tiam li uzas la nocion « socia klaso », kiu aperas en la teksto 1913 de la Deklaracio pri Homaranismo. Ĝi estas nur mencio. Sed por kiu rimarkas la honestecon, la zorgon de Z. tra ĉiuj sinsekvaj redaktoj, ne estas dubo : se li havis tempon, li enmetus en sian sistemon ankaŭ artikolojn pri la ekonomiaj disecoj.

Certe li ne kredis naive pri interklasa paco (kiel malprave asertis « Sennaciulo », 25-5-1934, pĝ 1) : tion pruvas la Memuaro por la kongreso de rasoj : « Daŭros... tiuj diversaj malpacoj, kiuj regas interne de ĉiu lando kaj gento, kiel ekzemple malpacoj politikaj, partiaj, ekonomiaj, klasaj, ktp ; sed la plej terura el ĉiuj malpacoj, la malamo *intergenta*, tute malaperos » (OV 351).

Ni ne miru, ke Z. ne havis tempon, ĝisfunde studi la demandon klasbatalo ; en la fluo de sia vivo ege okupita li ekkonis ĝin tro malfrue. Plie la bjelostokaj impresoj daŭre devigis lin rigardi unua la gentbatalon.

MALPLIMULTOJ.

Se oni volus resumi la doktrinon, oni preskaŭ povus diri, ke ĝi proponas solvon al la problemoj de la malplimultoj, — tiu problemoj, kiun Versajlo tiel malbone solvis, ke ĝi estis preteksto por la dua mondmilito.

De la komenco Z. asertas, ke li celas nur la diversgentajn landojn (LZ 1, 281), ne la okcidentajn landojn, krom ekz. pri Alzaco (LZ 1, 261). De la komenco li detale penas difini la hejmajn lingvon kaj religion, studi la patriotismon de la malplimultoj.

Li batalas por pura kaj vera patriotismo kaj kontraŭ la pseŭdo-patriotismo, t. e. la genta ŝovinismo.

Li starigas la moralan leĝon pri la « sengenteco de la tero ». Li tiel atingas veran sennaciismon.

Jam en 1927 Nekrasov sin demandis : « Ĉu estis Zamenhof... sennaciulo ? », kaj jese respondis, prave, citante la respondon al la fondantoj de la Tutmonda Hebrea Esp-ista Ligo : « Ĉiu nacionalismo prezentas por la homaro nur plej grandan malfeliĉon » (*Kvardek jaroj*, p. 21).

Du esprimoj de la « Manifesto de la sennaciistoj » : planeda patriotismo, venko de l'homeco super la nacieco, estas pure zamenhofaj.

LANTI KAJ HOMARANISMO.

Tial oni povas miri, ke Lanti, almenaŭ en la komenco, ne konis homaranismon, aŭ ne bone konis ĝin.

Li havis nur sarkasmojn por tiuj, kiujn li nomis « esp-istaj pacistoj, homaranoj k. s. utopiistoj » (*Vortoj*, p. 59). « Homaranoj estas kvazaŭ pastroj de nova religio. Ili trompas la popolon per senenhavaj esperoj kaj celoj. Necesas ja kontraŭbatali daŭre ilian nebulan ideologion... » (p. 156). « SAT-anoj mokas la religion, kiu estiĝis el la Z-a koncepto » (p. 124).

Se oni juĝas laŭ la lastcitita artikolo, Lanti probable ne vidis grandan diferencon inter la « interna ideo » kaj la detale formulita homaranismo. Ke tiun ĉi li ne legis, ŝajne pruvas la aserto : « La pacistoj ne provu per sofisma dialektiko starigi ian similon inter homaranismo kaj sennaciismo » (p. 157). Ankoraŭ pli pruvas pli malfrua diro : « Ni, sennaciistoj... konvinkiĝis, ke ne sufiĉas starigi lingvan ponton inter la nacioj, kiel celis Z., por ke ili vivu pace unu apud la aliaj. Ni opinias, ke la nacioj devas malaperi... » (*Leteroj*, p. 263).

En la fino de sia vivo, Lanti tamen akiras konceptojn multe pli nuancitajn... ĝis skribi, « ke Z. estis la unua *nekonscia sennaciisto* » (*Leteroj*, p. 259). Troas la vorto *nekonscia* !

Kaj tutan bukedon da Z-ajoj oni povas rikolti en la lastaj *Leteroj* de la patro de SAT : « Sapiro al tutmonda interfratiĝo de l'homoj, deziro labori al la faligo de l'miljaraj muroj, kiuj apartigas la popolojn, tiaj estis la instigiloj, kiuj igis Z. elpensi sennaciecan lingvon kaj dediĉi sian vivon al ties disvastigo. Ankoraŭ nun valoras por ni la samaj instigiloj. Sed por ni, sennaciistoj, ili fariĝis eĉ pli valoraj kaj efikaj... » (p. 263). « En mia kompreno pri moralo, la sento pri *homeco*, pri homa digno anstataŭus la nacian senton, fieron kaj ceteron » (p. 195). « En la menso de homoj la homeco superregu la rasecon » (p. 216). « Kio fakte malhelpas la tutmondan interfratiĝon, tio estas la patriotismo, la nacia aŭ rasa ideologio » (p. 249).

En tiuj leteroj de Lanti oni retrovas plurajn detalojn de la Z-a sistemo : la longa tempo necesa por realigi : « Versajne neniu el la plej junaj sennaciistoj vidos la efektivigon de siaj aspiroj » (p. 265) ; eĉ prireligiaj pripensoj : « Universalaj religioj kiel, ekzemple la budaismo kaj la kristanismo ludas grandan rolon en la socia vivo. Kaj estas tre nolinde, ke en ambaŭ religioj oni trovas ĉe la bazo samajn moralajn principojn, kiuj povas garanti pacan kaj harmonian vivon inter la homoj, se ili estus aplikataj » (p. 225) ; — eĉ la disigo de etiko kaj dogmoj ! : « Ĉar ne eblas fundamentigi moralon, akcepteblan de ĉiuj homoj, sur dia kredo aŭ religiaj dogmoj, necesas do serĉi alian bazon... Ĉar la homoj havas rilatojn inter si, necesas, ke ili agu laŭ maniero, ebliganta glatan, pacan interrilatadon » (p. 226).

Oni ne bezonas insisti pri du **fostoj**, kiuj de la komenco subtenis la idearon ambaŭ de Z. kaj de Lanti, kaj akcentas ilian doktrinofratecon : la taktiko « kvazaŭ embrie funkciigi societeton, ...de nun, krei sennaciecan popolon » ; kaj la intima ligiteco kun la lingvo, « bazoŝtono, per kiu oni komencu la konstruadon de racia, paca socio tutmonda » (*Leteroj*,

p. 241) ; « sennaciismo sen esperanto iel similus flugmaŝinon sen motoro » (p. 249) ; « esp-o estas la arbo, sennaciismo estos ties frukto » (p. 258).

Tiel alvenas Lanti al tiu konfeso — kiom fora el liaj vortoj de 1923-24 ! — : « Kritike al la sennaciismo, ke ĝi estas nur la nebula " interna ideo " de la aŭtoro de esperanto metita en formon akcepteblan de la laboristaro... tian riproĉon mi volonte akceptas » (*Leteroj*, p. 241).

Al tiuj, kiuj pli bone ol mi konas la penson de Lanti, konvenas klarigi tiun evoluon, ĉu oni povas diri pri li, renversante lian diron, ke li estis nekonscia homarano, — ĉu li, nova Sinjoro Jurdeno, homaranism-unis ne sciante tion...

Pri iu punkto Z-a li certe ne sciis en la j. 1926, kiam li ĝojis pro neatendita aprobo de Cart pri la disputata sufikso « io » (*Vortoj*, p. 118) : t. e. pri la sistema utiligo de « io » fare de Z. en kompleta regularo por neŭtraligo de la geografiaj nomoj (OV 327). Evidente, se Lanti sciis, li senmanke fanfarus pri ĝi ! Des pli ke Z. estis pli radikala eĉ ol la sennaciistoj : li forviŝis la rasnomojn (*Belgo* tamen eskapis lian atenton) kaj uzis landnomojn formitajn per la nomo de la ĉefurbo : « Parizio, Peterburgo » !

Tiun proponon Z. refaris en sia dummilita Alvoko al la Diplomatoj. (Tiuj ĉi ne nur ne forigis la gentajn nomojn, sed kreis novajn landojn kun gentaj nomoj, starigis novajn naciismojn... !)

MODESTA BJELOSTOKANO.

Tiu alvoko al la diplomatoj. « Post la Granda Milito », estis la lasta publikaĵo de Z. Inter diversaj sugestoj, kiujn detali ne estas eble ĉi tie, la propono pri neŭtraligo de la ŝtataj nomoj havis simblan gravecon. Z. insistis pri tio : « Se vi eĉ farus nenion alian, se vi nur forigus la gentajn nomojn de la landoj (afere tre facile farebla), vi jam farus per tio agon eksterordinare gravan, vi kreus novan eraon (1) en la historio de Eŭropo » (OV 356).

Tamen Z. estis mokata pro ĝi. Vidu ekz. Kolĉinski/Elsudo en « ABC de Sennaciismo » : « Rimedoj plejparte malrealaj » ... « eĉ miregige ridindaj kaj elmontras iun nekredetblan infanan naivecon »...

Ja oni devas konfesi malfortajn flankojn en la idealismaj penoj de Z., eĉ kontraŭdirojn. Oni konstatas ilin ofte kun surprizo, ĉar li aliflanke realigis. Li nature estis timema. Tial eksplikigas iaj malaŭdacoj, ekzemple liu daŭra nekapablo koncepti pure senreligian liberpensadon.

Li konsciis pri la nesufiĉo de siaj proponoj, pri la miskomprenoj, pri la moko, pri la malhelpoj, pri la longa daŭro de la klopodoj necesaj. Kaj tio eble de tempo al tempo ŝancelis lian optimismon. Tipa ekzemplo de malespera periodo estas tiu kurioza redaktoformo de la 1913a deklaro : « ... Tio paralizas mian entuziasmon por socia laborado..., mi ne devas malesperi, sed mi devas min konsoli per la kredo, ke la nenormala stato... pli aŭ malpli frue pasos kaj miaj filoj aŭ nepoj ĝuos tiun fortigan entuziasmon, kiun en mi paralizis la maljusteco de miaj samhejmanoj » (OV 341). Kiom malproksima tiu laca tono estas de la decidemaj : « Ni juris labori, ni juris batali... »

(1) En la O.V. = eron.

Entute la malalta, timema, nesana bjelostokano estis tro modesta. Lia emo al pseŭdonimoj ilustras tiun aspekton de lia personeco, kiun igas simpatia al ni la disrevigoj, speciale oftaj — kaj amaraj — sur la kampo homaranismo.

Ni diru la grandajn meritojn de Z. Li ne estis ia sekkora lingvisto. Li transcendis la lingvon. Li aŭdacis ligi ĝin al ideo, al idealo. Kiel en la antikva legendo, miraklo donis la vivon al lia amata skulptaĵo ; la dioj favoraj tiam estis : helpemaj pioniroj, entuziasmaj disĉiploj, sufiĉe taŭga epoko (oni bone scias, ke sin detenis ĝis nun diino Racio). Sed la ĉefan rolon ludis, kiel en ĉiuj mirakloj, la fido de la miraklofavorito, fido de idealista kreinto, fido kapabla levi la montojn...

A. CAUBEL (18 055)

(Tiu ĉi prelego aperis en "Sennacieca Revuo", 1957.)

Aperas ĉe SAT-Broŝurservo, en septembro 1985 :

LA NOVA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO

**RUBEN
FELDMAN GONZALEZ**

260 paĝoj.

Prezoj kun aŭfranko : 44 FF por Francio.

40 FF por aliaj landoj.

35 FF por abonantoj de "Laŭte!"

Jen kelkaj enkondukaj vortoj pri tiu verko :

LA NOVA PARADIGMO EN PSIKOLOGIO

La psikologia paradigmo, kiun oni prezentas en tiu ĉi verko, estas nova abstraktadordo en Psikologio kaj alproksimiĝo al la integriĝo de tiu ĉi disciplino kun la Neŭrofiziologio kaj la nuntempa Fiziko.

Ĝi implicas reorganizadon de malnovaj konceptoj : ĝi malreliefigas la emfazon sur la nekonscio, kiun ĝi lokas ene de unueca mensa procezo (la procezo mnemonika-eidetika-timika-aŭtonomika aŭ procezo META), kiu estas la esenco de la identeco (la mio), kaj kiu facile povas esti egaligita al la penso.

En la nova paradigmo, la emfazo lokigas en la t.n. "unu-ecca perceptado", kiu estas la integriĝo konscia kaj nekonscia de la agado de la kvin sensoj, precipe la vidado kaj la aŭdado. La koncepto pri unueca perceptado originas el baza eltrovo : la homo vivas ĝenerale en diversaj gradoj de diskonekso kun la realo. De tio rezultas la neceso re-lerni percepti, kaj konsekvence, pensi kaj sperti - relernado, kiu konsistigas la bazon de nova psikoterapio.

Alia koncepto grava kaj noveca estas tiu pri **karyon** aŭ kerno, kiun "topografie" oni povas priskribi kiel mensan spacon sen la centro de la "mio", kaj kiu "dinamike" inter respondas kun la stato de metanojo, t.e. kun tio, kio estas "trans la penso aŭ la scio".

Al la teoriaj esprimoj aldonigas, kiel valora didaktika komplemento, aro da notoj kaj transskriboj de dialogoj, kiel ankaŭ aro da elektitaj interkomunikoj inter la aŭtoro kaj la publiko ĉeestinta liajn prelegojn, dediĉitajn al la prezentado de la nova paradigmo, en Universitatoj kaj sciencaj institutoj el Usono, Eŭropo kaj Latinameriko.

D-ro Ruben Feldman Gonzalez, kuracisto-psikiatro diplomita en la Universitatoj del Litoral (Argentino) kaj de Miami (Usono) loĝas ekde 1974 en tiu ĉi lasta lando, kie li plenumas la taskojn de Direktoro de Infanpsikiatrio en la urbo Hanford, kaj kunordiganto de Mensa Sano por Infanoj kaj Adoleskantoj de Kings County, Kalifornio.

Nia nova debato :

PRI FORTRANĈOJ KAJ SANKTAJ FESTENOJ

Enkonduko de Ĝiz el Lamark

Vi certe scias, ke ĉe pluraj **nuntempaj** popoloj oni rigardas la voluptil-mutiladon* kiel prudentan rimedon por certigi la ĉastecon de edzino kaj protekti ŝin kontraŭ ŝiaj malbonaj pekemaj instinktoj. Multaj virinoj defendas tiun tradicion, kiu sekse kripligas ilin ; sed oni povas bone kompreni, kial ili tiel opinias ! Ĉu ili devus konfesi, ke la teruro kaj sufero de ili elportitaj estas tute senutilaj, valoras neniom ? Ili preferas alkroĉigi al la ideo, ke ili fariĝis "veraj virinoj" nur elportinte tian teruraĵon... ke ili fariĝis pli puraj.

Konsentite ; sed kial la bedaŭrindaj viroj devus resti ĉiam malpuraj ? Kial tiuj tradici-defendemaj virinoj ne proponas vere harmonian perfektigon de la tradicio per kompleta voluptil-fortranĉado do ankaŭ je la knaboj ? Tial la **pureco** de la socio estus nepre certigita, kaj ankaŭ la **vireco** de la geknaboj elportitaj (sen anestezio !) la operacion ; la seksaj rilatoj, finfine, okazus nur pro efektiva neceso de reproduktado, kaj estus preskaŭ tute senvoluptaj - aŭ eĉ malagrablaj - por la virino KAJ por la viro.

Ĉu ne estas tiu la celo de la virina mutilado ?

La seksa altiro restos tamen - ĉar ĝin produktas la hormonoj ovariaj aŭ testikaj - sed kompreneble la kopulaciemo estos vere bridita de la "okazintaĵo"... Ankaŭ la fekundigado restos ebla : ja multaj birduĉoj, inter kiuj la koko, ne havas penison sed bonege plenumas sian taskon !

Do, mi ne dubas, ke post taŭga edukado la senpenisigitaj knaboj rigardos sin mem "veraj viroj" same kiel nun okazas ĉe la knabinoj ; kaj ili certe postulos, ke la sama operacio estu farata al iliaj filetoj. Kial do senklitorigita aŭ preskaŭ senvulvigita virino ne pretendus edziniĝi nur al viro inda je ŝi, t.e. senpenisigita, do kiel eble plej ĉasta ?

"Ne estu egoismaj - mi dirus al tiuj virinoj - ho vi, plej puraj homoj ! Se tiel radikala operacio tiel bone efikis super vi, kial ĝi ne bone efikus ankaŭ ĉe la alia sekso ? Se, male, vi domaĝas vian fileton, domaĝu ankaŭ vian filineton kaj kuraĝu proponi por **ĉiuj geknaboj** iom pli artisman inicad-operacion, ekzemple tatuadon ; kolora tutaĵo, eble prezentanta simbolajn bildojn, estas certe pli bela ol fortranĉita

* **mutili** : intence kripligi, grave difekti iun aŭ ion.

seksaĵo, kaj oni povas igi la tatuadon sufiĉe doloriga por kontentigi ĉiujn postulojn de la inicado. Ĉu pozitivaj modifoj de la homa aspekto, kiel belaj kaj signifohavaj tatuajĵoj aŭ ankaŭ ornamaĵoj ŝvelcikatroj, ne estus pli fierindaj ol la postsignoj de mutilado?"

Perdolora inicado povas ja esti bona rimedo por distingi fortulojn disde malfortuloj, sed mutilado je nerezistopovaj infanoj aŭ eĉ je beboj estas krimo kontraŭ la Naturo, neniel pravigebla.

Neniu povas malpermesi al memrespondeca plenkreskulo kastrigi sin mem por akiri ĉastecon, kiel faris la prakristana filozofo Origeno ; sed neniu, eĉ ne la gepatroj aŭ la socio, rajtas blindigi aŭ sennazigi aŭ senseksigi aŭ alie mutili infanon ; se la "moro" tion petas, ĝi estas malmorala kaj devas esti anstataŭata.

Kaj neniu, kiu scias pri ankoraŭ ekzistanta malmoro aŭ krima kutimo, devas igi sin kunkulpa pro silento. Aŭ ĉu ni devas silente respekti ankaŭ kanibalismon ?

Ja kelkaj triboj kutimis kapti la anojn de aliaj triboj (ĉefe la infanojn) kaj ilin kuiri por festeno ; kaj kompreneble tio estis por ili plej sankta kaj respektinda "tradicio"...

Ĉu, laŭ vi, ekzistas "absolutaj" rajtoj de la homa individuo, aŭ ĉiu socio povas arbitre decidi, kiajn rajtojn kaj devojn havos ĝiaj anoj ? Se, ekzemple, en iu socio la moro kaj la religio permesus, eĉ aprobus, ke la riĉuloj aĉetu kaj manĝu en gajaj festenoj la superfluaĵojn de la malriĉuloj - kiel en la "Modesta Propono" de la satiristo Swift - ĉu la aliaj popoloj devus egalanime rigardi tiajn festenojn, omaĝe al la principo, ke oni ne devas enmiksiĝi en la internajn aferojn de alia regno aŭ en la moroj de alia popolo ?

Jakelino :

Vana debato. Mi tute ne vidas, kiel interesa povas esti debato inter homoj, kiuj ĉiuj samopinias pri la proponita temo. La listo de partoprenantoj en la ĉeno, kies unua kontribuanto mi estas, mencias nur okcidentajn eŭropanojn. Nu, mi konas nur unu eŭropan homon, kiu aprobas fortranĉon de klitorio : temas pri psikanalizistino Françoise Dolto. Ŝi asertas, ke fortranĉon de klitorio inventis virinoj, ĉar ĝi plifortigas la vaginan ĝuadon. Nu, mi pretas kredi al sinjorino Dolto... se ŝi mem fortranĉigis sian propran klitoron. Escepte de ŝi, ĉiuj eŭropanoj, kiuj scias pri tiu kutimo, ĝin malaprobas. Restas ankoraŭ eŭropanoj, kiuj ne konas la problemon. Por ili, Ĝiz

verku informan tekston, anstataŭ sendi akuzparoladon al senkulpuloj. Kial prediki al konvertitoj ?

Se la laŭtuloj apartenus al alia kulturo, mi imagas, ke azia aŭ afrika laŭtulino povus enkonduki debaton pri aborto, eksplikante ke, en kelkaj popoloj nuntempaj, estas barbarinoj, kiuj ne hezitas mortigi embriojn, kiujn ili ne deziras naski. Ŝi konkludus, ke nome de la vivrajto, kiun posedas la embrioj, oni devas interveni, por ke ĉesu tiu malmorala kutimo. Ĉu estas pli ĝoja estonto por embriino tuj morti, ol vivi sen seksa ĝuado ?

Ĉar aborto estas ekster la temo de tiu ĉi debato, mi notas miajn pensojn pri tiu alia temo sur aparta folio.

Konkludo de la unuaj 58 linioj de la enkonduko : estas tute racia motivo, por ke oni gardu kaj nasku la nedeziratajn embriojn : novnaskito produktas pli da viando, ol 10-semajna embrio.

Kaj nun pri la lasta paragrafo :

Individuo kaj socio. Ĝiz demandas min, ĉu, laŭ mi, ekzistas "absolutaj" rajtoj de la homa individuo, aŭ ĉu socio povas arbitre decidi, kiajn rajtojn kaj devojn havos ĝiaj anoj ? Nu :

- **individuo** ne estas universala koncepto : tiu koncepto aperis je iu difinita epoko en iu difinita socio. Se mi estas bone informita (tamen pri tio mi ne certas), la koncepto "individuo" estas helendevena. Ĝi nur malrapide disvolviĝis en Eŭropo : fine de la ĝesto de Rolando (epopeo, kiu estas unu el la plej malnovaj verkoj de la franca literaturo) pro la perfido de Ganelon, Karolo la Granda kondamnas al morto, ne nur Ganelon-on mem, sed krome lian tutan genton. Tamen la helenoj sukcesis influi la eŭropan kulturon, kaj, ĉar eŭropanoj perforte trudis siajn morojn al aliaj kontinentoj, la rezulto estis, ke en 1948 aperis la universala deklaro de homrajtoj, kiu pli-malpli difinas la rajtojn de individuo fronte al socio. Tiu teksto estas tre riproĉinda, ekzemple :

- ĝin redaktis ŝtatoj, kaj nur ili povas ĝin apliki. Se ili ĝin ne aplikas, neniu povas trudi, ke ili faru.

- la rajto pri proprieto estas nur la rajto ekspluati aliajn homojn.

- la rajto vivi ne aplikiĝas al militistoj, nek al mortkondamnitaj (nek al embrioj).

- ne estas en ĝi la rajto manĝi ĝis satiĝo, kiu, laŭ mi, estas multe pli grava, ol la rajto esprimi politikan opinion. Tiun deklaron kompletigas internaciaj paktoj, kiuj koncernas multajn landojn (ekzemple la pakto kontraŭ torturo), aŭ

nur parton de nia planedo (kiel, ekzemple, la eŭropa deklaro pri homrajtoj). (Informoj pri tiuj tekstoj estas haveblaj ĉe Amnestio Internacia).

Tiu tekstaro ne havas grandan influon (oni plu torturas...), tamen ĝi ekzistas, kaj ĝia ekzisto montras, ke finfine en la 20a jarcento alvenas ĝis homa menso la ideo, ke individuo havas rajtojn. Tio, laŭ mi, estas progreso, kaj oni devas esperi, ke estonte tiu ekideo disvolviĝos.

- la vorton "arbitre" Ĝiz skribis pro kondiĉita reflekso : socia decido povas esti nur "arbitra", same kiel (almenaŭ en franca lingvo) juna kadro nepre estas "dinamika", kaj krizo "konjekta". Ĉu decido de socio nepre devas esti arbitra? Aŭ ĉu povas ekzisti decidoj malarbitraj, t.e. demokratiaj? Nuntempe, la plimulto de homaj socioj efektive estas maldemokratiaj. La franca respubliko estas iom pli demokratia, ol estas la plimulto de ŝtatoj, tamen ĝi arbitre decidis, ke mi estos franca civitanino : 26 horojn kaj 10 minutojn post mia naskiĝo, iu sinjorino Joséphine Henry, edzino de Le Cam pri kiu mi poste neniam reaŭdis, plenumis sian devon de ĉef-akuŝistino, deklarante al vicurbestrino de urbo Saint-Denis, ke mi ĵus naskiĝis. De tiu tempo, mi estas ano de granda homa socio, kiu nomiĝas "franca respubliko". Unu monaton poste, oni portis min al katolika preĝejo, kaj pastro metis demandon, kiun mi ne komprenis. Mi respondis "arre, arre", kio, en la internacia beba lingvo, signifas "kie estas mia suĉbotelo?", sed tiu kaculo, miskomprenante, ke mi diras "amen" metis akvon sur mian frunton. Dum 8 jaroj, tiu miskompreno restis senkonsekvenc, sed kun 8 jaroj mi ekĝuis la "katekismon por uzo de la francaj diocezoj", kies unua demando estis : "Kial oni diras, ke vi estas kristana?". Nu, ĉar tio estis ĝuste la unua punkto de la unua leciono, kiel mi kompatindulino povus koni la respondon? Se mi estus pli matura, mi respondus : "Ba, sciu, homoj diras tiom da stultaĵoj...". Sed kun 8 jaroj mi estis jam logika, sed ankoraŭ ne matura, do la respondon mi parkerigis (kaj poste forgesis). Unu jaron poste, maljunulo strange vestita vangofrapis min, kaj sekve de tio inspiras min nun la Sankta Spirito, kiel certe jam rimarkis la legantoj de Laŭte. Samtempe, en laika lernejo, oni instruis al mi, ke mi fieru pri mia aparteno al la franca nacio, ĉar tiu nacio alportis kulturon al aliaj kontinentoj, ekzemple al Alĝerio. Mi poste atingis, ke la parokestro de Saint Denys de l'Estrée notu, ke laŭ mia propra konscienco mi ne estas katolika (laŭ katolika teologio, baptita mi estas por la eterneco), sed mi ne scias, ĉu mi povus ekŝiĝi el la

franca respubliko, se tion mi volus. Verŝajne la proceduro estus komplikega. Do nur dum 26 horoj kaj 10 minutoj mi sukcesis aparteni al neniu socio. Sama misaventuro okazis al mia edzo, sed, ĉar li naskiĝis iom pli oriente, li apartenas, same senvole kiel mi, al iu socio nomata "pola popola respubliko". Sekvo de tio estas, ke por iri al Svislando li devas atingi, ke iu viro, kiun ni ne konas, renovigu la dokumenton, laŭ kio li plu estas membro de tiu socio.

Do efektive ŝtatoj estas arbitraj socioj. Principe mi opinias, ke oni devus agnoski al iu ajn individuo la rajton ekŝiĝi el ia ajn socio, inkluzive de la ŝtato, kies civitano li aŭ ŝi estas. Nu, tio estas ja bona principo : ĉiu aliĝu (aŭ ne aliĝu) al iu socio nur pro propra volo, kaj forlasu ĝin libere, se li aŭ ŝi volas. Se tiel estus organizitaj ĉiuj homaj socioj, oni povus diri, ke socio ne estas arbitra. Jes ja, sed restas la problemo de la infanoj : male de aliaj bestidoj, homido bezonas multe da tempo por maturiĝi : unu jaron ĝi bezonas por kapabli piediri, almenaŭ du jarojn por paroli, ktp. Do, ĝis la homido estas sufiĉe matura por mem decidi pri aliĝo al iu socio, kion oni faru pri ĝi? Oni povas trakti ĝin nur kiel membron de iu socio (plej ofte, tiu de la gepatroj), kaj ne estas eviteble, ke tiu socio eduku ĝin laŭ sia propra koncepto. La nura rajto, kiun oni povas doni al ĝi, estas ke, kiam ĝi estos matura homo, ĝi povos foriri.

Similan problemon mi spertis pro miaj psikaj problemoj. Mi iam demandis psikiatrinon kial, post mia unua krizo, oni enŝlosis min en hospitalon, sen demandi pri mia konsento. Inter la argumentoj, kiujn ŝi donis al mi, estis tiu : ĉar mi ne kapablas mem vivteni min, la socio devis interveni, kaj, kompreneble, ĝi intervenis laŭ siaj propraj reguloj. Kion mi povas rebati al tio? Ĉu la ĝendarmoj, kiuj veturigis min al hospitalo, devus pensi : "Ŝi nenion petas de ni, do ni lasos ŝin morti"? Ĉu la psikiatro, kiu decidis min gardi en sia hospitalo, povis fari ion ajn alian ol tion, kio estas normala por psikiatrio en difinita socio?

Nur homo matura povas ekŝiĝi el socio. Plej ofte, cetere, tiu ekŝiĝo ne estas kompleta : oni povas bredi kaprinojn en Lozerio, sed, se oni vendas fromaĝojn ĉe urbeto bazaro, oni vole-nevole apartenas al socio. Sed homo nematura ne povas eviti, ke socio trudu al ĝi siajn proprajn principojn.

Tiu demando fakte postulus longan debaton, sed ŝajnas al mi, ke pri tiu temo jam legeblis multo en "Laŭte!".

Paŭlo :

PRI FORTRANĈOJ KAJ SANKTAJ FESTENOJ

1. EN OKCIDENTAJ LANDOJ

Antaŭ jarcentoj, en eŭropaj landoj, la krucistoj iris batali malproksimen, kaj protektis dume sian edzan sekurecon per "ĉastzono". Tiuj aparatoj estis tre simplaj aŭ tre kompleksaj, kaj devis malpermesi al virinoj havi seksajn kunigojn dum malĉeesto de siaj edzoj.

Nuntempe oni multe ridus pri tiu sistemo, kiu certe kreis malfacilaĵojn por tiuj soligitaj virinoj, sed ne tute malpermeson. Poste ankoraŭ, viroj esperis, dank'al malpermeso de kontraŭkoncipo, ĉiam protekti sian sekurecon en tiu kadro. Hodiaŭ virinoj estas - preskaŭ - komplete liberigitaj, ĉar naskoregulado estas laŭleĝa de kelkaj jaroj. Samtempe viroj lokas siajn lastajn rimedojn kaj esperojn en seksaj malsanoj por per timo kontraŭigi tiun liberecon de siaj kunulinoj. Sed viroj neniel limigas siajn proprajn seksajn eksteredzajn eblecojn.

Sed tio ne konsistas en iu speco el fortranĉo de iu organo. Tute same kiel ĉenetoj, kiuj kunligis en malnova Babilono la maleolajn ringojn de virgulinoj.

Tamen en niaj landoj "civilizitaj", ne ĉio estas "blanka" : aliaj fortranĉoj ekzistas, kiujn ne akompanas festenoj, sed estas sufiĉe oftaj kaj kritikeblaj por ne esti forgesitaj. La kirurgoj facile fortranĉas ovariojn aŭ uterojn, aŭ ambaŭ, el siaj malsanaj klientinoj. Tamen samtempe vazektomio ne estas tiel facile akceptita de ili kaj pli ĝenerale de viroj.

2. EN ALIAJ LANDOJ

En kelkaj orientaj popoloj oni praktikas cirkumcidon de junaj knaboj. Jam de jaroj la klarigo konfesata estas higieno. Maliculoj diras, ke la vera kialo estus malpermesi masturbon ĉe junuloj. Cetere, aliaj popoloj praktikas "cirkumcidon" ĉe knabinoj. Ili por tio tranĉas klitoron. Nu, tiu organo estas tuta ekvivalento de vira penis ĉe virinoj : tiu operacio estas ne tute tiel simpla kiel ĉe knaboj. Tiu certe malebligas eksteran masturbon ĉe tiu onta junulino kaj ankaŭ ne faciligos ĝuon ĉe la plenkreska virino. Sed kial do ĝuigi "siajn" virinojn, kiuj poste povus havi malbonajn ideojn, same kiel tiuj diboĉulinoj el eŭropaj landoj ?

Tio ne ĉiam sufiĉas : en aliaj popoloj oni ne nur fortranĉas klitoron, sed samtempe oni kudras vulvlipojn por pli bone protekti virgulinojn kontraŭ iu seksa kunigo. Poste, la venonta edzo multe ŝatos tiun nesufiĉe malfermitan piĉon ! Oni diras

eĉ, ke post nasko de infano oni refermos tiun vulvon.

Mi ne scias ekzakte ĝis kie tiu agmaniero povas iri. Mi ne proponas iri denove krucmiliti kontraŭ tiuj popoloj por transporti ĉe ilin nian "progreseman civilizacion". Konigi al ili kiel oni vivas ĉe ni kaj kion oni povas pensi pri tiuj agoj. Ili mem devas elekti.

3. KONKLUDE

Kiam tiuj homoj venas vivi en eŭropaj landoj, fortranĉoj estas ĉi tie laŭleĝe malpermesataj kaj punataj. Do mi opinias, ke :

- fortranĉo de klitorio aŭ kudrado de vulvo ĉe ĉiudevenaj knabinoj vivantaj en eŭropaj landoj, devas esti malpermesataj kaj punataj laŭleĝe.

- Cirkumcido de knaboj povas esti praktikata ĉe knaboj laŭ iliaj religioj aŭ okaze de fimozo sed kun kontrolo kuracista. Samtempe oni ne devus permesi propagandon pri ĝeneraligo de tia fortranĉo ĉe ĉiuj knaboj - kion ofte kelkaj kuracistoj ŝajnas konsili.

- Plie, se plenkreskuloj - viroj aŭ virinoj - deziras por si cirkumcidon, eĉ kudradon, tion ili faru. Nu, kial ne permesi vazektomion anstataŭ praktiki nur vazstringon ĉe virinoj ?

- Enmigrintoj devas alporti novajn ideojn kaj agmanierojn en la ŝtatojn, kie ili ekloĝas, kaj samtempe lerni novan vivmanieron ; tio devas esti en la direkto de ĉies progreso, ne de malprogreso por ĉiuj ! Tio estas mia espero.

Ĵanseb :

RELATIVECO

Mi parolos al vi pri stranga popolo, kiu havas plej strangajn kutimojn kaj pensmanieron. Ĝi kredas nek je la dioj nek je la Diablo. Tiu popolo indignas, kiam oni operacias la voluptilon de la virinoj, por ke ili ne plu peku. Tio evitas al ili la eternajn suferojn de l' infero. Ĉu la sama popolo indignas, kiam oni fortranĉas apendicon, por eviti suferon al malsanulo ?

Ili estas danĝeraj fanatikuloj. Ili ĉiam estas certaj, ke ili pravas eĉ (kaj ĉefe) kiam ili eraras.

Ili havas kontraŭdirajn religiojn. Unu el ili, kiun ili nomas "scienco", havas strangajn diojn : Kvarko, Dio de la materio, Bigbang, Dio de la komenco de l'universo... Kompreneble, tiujn diojn ili neniam vidis, sed ili fidas iliajn sorĉistojn, kiuj surmetas blankajn bluzojn kaj okulvitrojn. Tiuj iloj atestas ilian sciencon nekonfuzeblan kun iu ajn superstiĉo.

Ili havas alian religion, kiun ili nomas tiel, kaj kies

emblemo estas torturilo. Cetere, ili kredas malpli kaj malpli je ĝi. Nome de tiu religio kaj de ties Dio, ili ne fortranĉas voluptilojn, sed foje ĵetis la tutan homon en la fajron, lasante al Dio la taskon apartigi la bonon disde la malbono. Feliĉe tiuj kutimoj iĝas maloftaj.

Sian trian religion ili nomas "Ekonomio". Ĝiaj dioj estas la bona Ekspansio, kaj la malbona, Krizo. Al tiu ĉi dio oni devas oferi milionojn da homoj, kiuj perdas siajn vivrimedojn. Ili ne rajtas dividi la tutan laboron kaj riĉecon inter ĉiuj popoloj, ĉar tio riskus kolerigi la Dion. La alia dio, Ekspansio, petas siaflanke, ke la homo amasigu vendaĵojn en siaj hejmoj : fridujojn, televidilojn, ktp... Ili pretendas, ke tio feliĉigas ilin, sed ili ne ŝajnas pli feliĉaj ol tiuj, kiuj plenumas nur siajn bazajn bezonojn, ĉar al ili mankas amo.

Ili eĉ bezonas sorĉistojn por forigi la malfeliĉon, kiun metis en ilian animon Nekonscio, la dio de l' Amo kaj malamo.

Sed kiel tio rilatas kun nia problemoj ? Jen... mi faras jenan demandon : Ĉu la homaj rajtoj estas absolutaj principoj aŭ nur kreaĵo de la Okcidenta civilizacio ? Ĉu ankaŭ aliaj civilizacioj ne havas principojn, kiuj estas tiel gravaj por ili, kiel por ni la Homaj Rajtoj, sed kiuj foje kontraŭdiras ilin ?

Kiel okcidentano mi opinias, ke oni devas vigle defendi ilin kaj batali por ili. Kiel homo - laŭ okcidenta vidpunkto - mi opinias same. Sed ĉu ni rajtas trudi niajn ideojn al aliaj, pretekste ke ni havas la plej bonajn ? Kiurimede ni malpermesus al lando tiajn kutimojn, kia seksmutilado ? Ĉu per milito ? Ĉu per atombombo ? Ĉu tia solvo ne spitus Homajn Rajtojn ?

La nura ebleco estas, laŭ mi, provi konvinki ilin, kaj ĉefe aŭskulti iliajn argumentojn, eĉ se tio ŝajnas al ni antaŭe stultaĵoj.

Eble, ni mem, nevole, fortranĉas voluptilojn de aliaj personoj, ne de ilia korpo, sed de ilia spirito, aŭ koro. Ĉu ni estas certaj, ke ni neniam malebligis aliies plezuron ?

la venonta n-ro aperos fine de novembro
Estas bonvenaj ĉies sugestoj pri temoj
pritraktotaj per ĉenleteroj (rubriko "Nia debato")
Aldonu enkondukon. Dankon !

J.G. :

Lastan someron mi ĉeestis kunvenon de mondcivitanoj, kie okazis prelego pri la virinaj rajtoj fare de fakulino de UNESKO. Dum la prelego estis speciala ĉapitro pri la seksmutilado en afrikaj landoj, laŭ okcidenta vidpunkto, kompreneble ! Pluraj afrikaj studentoj el Kongio, Malio, Senegalio, partoprenis la kunvenon. Oni petis iliajn vidpunktojn. Ili respondis al la fakulino : "Ni tute konsentas kun vi, ĉar ni loĝas en urboj kaj vivas laŭ eŭropa maniero (fakte ili ne estis vestitaj per bubuo sed per eŭropa vestaĵo), sed en vilaĝoj estas aliaj familiaj kaj tribaj ligiloj".

La (aĉa) kutimo estas tre malnova, ne ligita al la islama religio, kiel mi kredis, sed multe pli malnova kaj profunde enradikiĝinta en la moroj. Laŭ la afrikaj studentoj, leĝo malpermesanta la seksan fortranĉon ne sufiĉus, ĉar tio tamen kaŝe okazus sen higiena rimedo. Nur evoluado de la moroj ĉe gejunuloj edukataj aliamaniere povus vere ŝanĝi la aferon. Tian ŝanĝon ne devas perforte aŭ almenaŭ ekstere enkonduki la okcidentaj landoj, sed nur la Afrikanoj povas iniciati ĝin.

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis, ke la nova registaro de Burkina Fâso (eksa Alta Volta) komencis kampanjon pri seksmutiladoj, en lernejoj, gazetoj, ktp. Tie estas, laŭ mi, la bona vojo. Tranĉi la penison de la knabo certe elstarigus la seksan egalecon sed same kiel, se oni ekkaptus la monon de riĉuloj, por ke ĉiuj homoj estu malriĉuloj. Ĉu tio estus solvo ?

Suzanne :

Tiu ĉi mia kontribuaĵo konsistas el ekstraktoj el libroj, ĉefe de Benoîte Groult : "Ainsi soit-elle", "Le féminisme au masculin". Memkompreneble, por funde trakti la problemon necesas fontoj, kiujn izolita homo povas ĉerpi nur el tekstoj tiutemaj. Des pli ke por homo, kiu ne rilatas kun sciantoj, estas neeble eĉ koni la faktojn. Kvankam mi koncize skribis, tiu teksto estas iom longa; sed mi opinias, ke oni eltraktu la temon ; se ne, estas preferinde silenti. Mi elektis argumentojn, kiujn mi juĝis trafaj kaj pravaj.

Ĉu vi scias, ke la egiptaj inaj mumioj suferis la fortranĉon de sia klitorio, eĉ Nefertiti kaj Kleopatra ? Kvankam oni laŭdis la liberalan civilizacion de Egipto. Kiam oni legis la priskribon de tia martiriĝo, oni sin demandu, ĉu la homa menskapablo estas laŭdinda (ja, ĝi kulpas ne nur pro tiu aĉaĵo,

ho ve!) sed hodiaŭ ni traktas ian temon.

Kio estas nekomprenbla, ne imagebla, tio estas la fakto, ke virinoj, kiam jam suferis tian martiriĝon, kaj certe ankoraŭ elportas ĝiajn konsekvencajn suferojn, plenumas tion. Certe, la virinoj estas kondiĉitaj... Verŝajne oni enkapigis(as) tion al ili (same kiel en Eŭropo oni persvadis la virinon, ke i.a. ŝi ekzistas nur por mastrumi, varti infanojn, sklavi, ĉar virino estas malsupera estulo). Tia kondiĉado estas ia "voluptil-mutilado" ja malpli okulfrapa kaj unuavide malpli kruela ; verŝajne, inoj preferus ĝin ol la klitorektomion, la vulvobridadon, la kolringadon, la lipplatigadon. Tamen la ina sklaveco ĉie regas... la sklavado ebligas nenian edukadon, ĉar ĝia propraĵo estas sufoki ĉiujn kapablojn. (.....)

Pri klitorektomio : la homan dignon tio dolorigas. Mi doloras pri ĉiuj ĉi virinoj, kiuj nin similas, kiuj estas tute forignorataj, kripligitaj, kies vero estas ruinigata. Oni doloras ankaŭ pro ĉiuj ĉi stultaj viroj, kiuj kredas esti nepre superaj en ĉio, kaj kiuj elektis por tio solvon la plej facilan kaj la plej malnobligan por ambaŭ : malsuperigante la aliulon. Por tiuj necesas unue la posedaĵo de ina sekso reduktita al la necesego. Rekte la malo de tio, kion plaĉe, hodiaŭ, plejofte oni imagas, la viro ne serĉas dum la seksrilatoj plezurinterŝanĝon... Nu, tiun minimumon la edzo rifuzas al sia edzino ; ĉar ina libereco konsistigas riskon por li. Jen kial "la malamo al la klitorio estas preskaŭ universala" (D-ro G. Zwang en "Le sexe de la femme" (la virina sekso).

En sia libro "La virina kondiĉaro en Alĝerio" Rachid Boudjedra diras : "...en nia alĝeria socio la virinoj havas nur unu rajton : havi kaj prizorgi seksorganon". Eĉ koste de mutilado la garantio por la edzo neniam estas absoluta nek definitiva, tial ĉar la ĉefa seksa organo de la homa specio situas ne inter la kruoj sed en la kranio.... Ĉie, kiuj havas povon super aliaj estuloj, tiuj havas nuran celon : konservi ĝin. Koncerne nigrulojn, servutulojn, malriĉulojn aŭ virinojn, neniam la rajtoj estis konsentitaj. Des pli ke, feliĉe por la viroj "la fonto el tia deziro, la absurdeca klitorio, estas perfekte atingebla per tranĉilo" (G. Zwang).

Iuj kuraĝaj landoj kontraŭstaras la rasan diskriminacion. En Rodezio, en Sud-Afriko, ekzemple. Sed neniu eĉ aludas pri la seksa diskriminacio. Ŝtatestroj, kiuj, hejme, estas uloj relative liberalaj, konsentas kunsidi ĉe UNO flanke de suverenaj princoj, kies virinoj estas tranĉitaj, kuditaj, suferas la fortranĉon, la vulvoreduktadon aŭ, en la plej bona okazo, kondamnitaj al silento kaj al senscio, amasigitaj

kiel kokinoj en ĉirkaŭfermita loko, transveturataj eksterlandan kiel simiinaro en kaĝoj... En Kenjo la ribelo de la Maŭ-Maŭ estis direktita parte kontraŭ la provo de la britaj aŭtoritatoj por haltigi la klitorektomion. La rebato estis sanga ! La Maŭ-Maŭ plezurigis sin, ekscizante iun nombron da dumbatale kaptitajn anglinojn. Kaj la ĉefo, Jome Kenjata, iama studento en anglaj universitatoj, klare precizigis en sia libro "En la ombro de la Monto Kenja" : "...neniu Gikuju inda je tiu nomo, deziras edziĝi kun ne ekscizita junulino, ĉar tiu operacio estas la kondiĉo sine qua non ricevi kompletan instruon pri moralo kaj religio." Kiam, fine, li prenis la regpovon, senprokraste li restarigis la klitorektomion, "stulte kontraŭstaritan de tro sentemaj fervoraj afrikanoj", laŭ lia diro.

Komprenble, ke la ĝenerala direktor-prezidanto de ELF-ERAP (petrolkompanio) manpremas ilian manon, eĉ kun malpruda okulado... inter viroj, ĉu ne?!..., ke la ministro pri Eksterlandaj Aferoj konsideras ilin kleraj ĉefoj... (petrolpolitiko tion trudas...). Sed inter ĵurnalistoj neniu parolas pri tio, do neniu scias tion. Estas aferoj pri inaj organoj, do, ne gravas : ĉiu libere agas pri sia edzino, sia domo, sia kamelo, ĉu ne ?

Ĉe UNESKO, pudore oni silentas : ni ne ekdebatu pri klitorio en kleriga asembleo. Ha, se tiuj ĉi popoloj tranĉus la dikan fingron aŭ la nazon al siaj edzinoj, eblus indigni en tia kazo. Esploristoj, etnologoj, la grandaj reporteraj ŝajnigas kredi je pitoreska, religia tradicio, kaj nur diskrete oni aludas la inic-ceremoniojn de la junulinoj.

En virinaj asocioj, tre malofte oni parolas pri tiaj aĵoj.

La utero, la ovarioj, reproduktorganoj, bone ! Sed tiu aĵeto, dediĉita nur por la plezuro, tio estas nedeca. Kaj tiu organo ne servas al la viro nek al la nasko, do oni ignoru ĝin, aŭ ĝin detruu, kiel oni faras.

Kiel diras J.G., nur per instruado eblas tion malaperigi, kondiĉe ke la tieaj regantoj tion volu. Vidu ĉi-supre !

Pri la homaj rajtoj : homo, kiu atentis pri la mondaj kaj naciaj eventoj, opinias ke ili ne estas aplikataj ! Eĉ se ŝtatestro aŭ similulo teatre, pompe agnoskas ilin (liadire!). En ĉiuj kampoj, de la aranĝo de militplanoj ĝis la enkarcerita traktado, sen forgesi la diversajn medicinajn trudojn, i.a., ne necesas ekzamenoj, ofte danĝeraj. En tiu kampo la virinoj estas favorataj ! Plie, vidu la manipulojn en la inaj organoj ! Vere, la ina korpo estas senfine la melkebla bovino.

Mi ĵus aŭdis en radiofonia intervjuo roman-aŭtoron dirantan :
"La virina seksplezuro dum la sekskuniĝo estas nekomprenebla funkciado ; ĝi ne estas videbla kiel la vira. Do, mistera."

Notinde : Kiam viro ne komprenas inecan fakton, ĝian funkciadon, tuj li juĝas ĝin mistera, aĉa, kaj aĉe agas kontraŭ ĝi... ĉar, spite la multnombrajn esplorojn en tiu kampo, laŭdire restas ankoraŭ mistero. Oni sin demandu kian prov-esploron la vira imago elpensos, inventos ! Laŭ la pasintaj agadaĉoj, povus okazi plia agadaĉo.

Ĉiam en radiofonia dissendo, tiu pri sonĝoj. Kompreneble, la esploroj estis diversaj, same kiel la "kobajoj". Inter ili, kuniklino : ĉe ŝi, oni observis la reagojn de ŝia anuso... mi ne plu ĝuste memoras la klarigojn, sed mi scias, ke temis pri erotika reago dum sonĝo ! Kion do la virino suferos ?

Nicole D.

Kutimoj kaj moroj en socio, ĉu pasinta, ĉu nuna, formas tuton, kies ekvilibro estas pli-malpli firma. Apartigi iun kutimon disde la aliaj ofte okazigas misinterpreton. Kompreni, ĝuste juĝi alian civilizacion ne estas tiel facile.

Tion dirite, mi tuj respondas : "Jes, estas absolutaj rajtoj de la homa individuo."

Jam de longe estas multe da pensoj, verkoj, klopodoj, bataloj, fare de individuoj, asocioj, organizoj, por agnoskigi tiujn rajtojn. Ĉiuj konas la "Universalan Deklaracion pri la homaj rajtoj" (eĉ tiujn de la Infano en UNICEF).

Almenaŭ sur papero estas laŭleĝaj rajtoj !

La ĉefa afero, la plej malfacila, estas, ke oni ne ofendo-moku tiujn rajtojn...

Sed ni devas atenti ne konfuzi tiujn rajtojn kun tiuj, kiujn sin arogas homoj. Jen ekzemploj inter multaj, kiuj svarmas en nia mondo :

Martireco, submetiĝo de infano : "rajto" de plenkreskulo. Seksaj mutiladoj, ŝtonumado de adultulino, mortigo de ĵus-naskitaj filinetoj... : "rajto" de la viroj.

Kanibalismo, sklaveco, mortpunoj... : "rajtoj" de plejfortuloj. Torturoj, malliberiĝo pro politika aŭ filozofia opinio... : "rajto" de totalismo, de despotismo...

Fakte, ĉiam temas pri submetigo de la malpli potenca fare de la pli potenca, estas trompado.

Tiu "barbareco" iĝas socia, politika aŭ eĉ morala kutimo pro pli-malpli da komplaceco, konscia aŭ ne, de la plimulto, aŭ ankaŭ pro malkuraĝo, timo, nescio...

Vidu la homan historion !

Nun revenu al la ekzemploj de Ĝiz el Lamark kaj pripensu :
- Kanibalismo kontraŭ milit-detru-povo,
- Seksmutilado kontraŭ nevola prostituĝo,
- Triono el la homaro eltenas, ke du trionoj suferas mizeregon.
Kiujn lecionojn eblas doni en tia plendinda situacio ?

Kiam oni scias, ke :

Respekti malsamecon ne estas aprobi neegalecon, maljustecon,

Postuli liberecon ne estas aprobi liberalismon, kiu premas, malestimas la plimulton,

Iĝi tolerema ne estas iĝi indiferenta aŭ malkuraĝa,

Esti pacema ne estas permesi, ke militoj, mizeroj, okazu en najbara aŭ malproksima loko,...

devus esti devo "enmiksiĝi en la internajn aferojn de alia regno aŭ en la morojn de alia popolo", kiam temas pri ekspluatado, murdo, submetigo, rasismo... Sed kondiĉe, ke tiu, kiu intervenas, estu neprofitema, neperforta, kaj estu kapabla konsciigi la aliajn pri la justeco, la taŭĝeco de siaj ideoj.

La plej taŭĝaj rimedoj, laŭ mi, estus malfermi la landlimojn, instigi al interŝanĝoj, renkontoj, kunlaborado inter la popoloj.

Ĉiel, necesas multe da tempo por konkreta kaj firma progresado de la homaro, por forstreko de ĝiaj kontraŭdiroj, se eblas.

Garolo :

Notinde estas en la ĉenleteroj, kaj ĝenerale ĉe la SAT-anoj, ke ĉiuj kutimas pli aŭ malpli akordiĝi kaj samopinii en la proponitaj temoj. Efektive, kiam temas pri moroj, kutimoj aŭ aliaj tradiciaĵoj de l'homoj, la malracio estas evidenta kaj tre malfacile akceptebla ; mutilado, fortranĉado de korpaj elementoj kun aŭ sen sanktaj festenoj tute ne povas esti escepto. Por ne vane prozumi kaj nur plenigi la paĝojn de "Laŭte!", mi provos esprimi min pli esence, akompanante la penson de Nicole pri la fama "rajto".

Mi pensas, ke la epoko de la "rajto" iom elmodiĝis : la "rajto" estas reago de la individuo kontraŭ la kolektivon aŭ, inverse, "rajto" estas povo de la kolektivo sur la individuon. La kolektiveco, cetere, estas la plej moderna mito, kiun la homgrupo (socio) havigis al si por sklaviĝi, submetiĝi, esti ekspluatata aŭ eĉ mutilata. En tiu kadro, la individuo, kiu petas pri siaj rajtoj, ĝenerale, tute simple forgesas plenumi siajn plej elementajn "devojn". Laŭ mi, ĉi tie kuŝas la dramo de nia kolektiveca mondo, sed tio estas alia afero, kaj ni revenu al la homo kiel individuo, aŭ ĉu la individuo ne

estas la plej grava afero, kiu cetere konsistigas la socion ?

Laŭ individueca konsidero, mi tute ne vidas kontraŭajn dispoziciojn el moraloj, el moroj k.s., kiuj povus malpermesi, ke homo detranĉu de si mem penison, klitoron aŭ alian organon. Tamen, se tiu homo efektive ekzistus, mi amike konsilus, ke ĝi tute simple detranĉu la kapon, ĉar temas pri fuĝo de naturleĝo... aŭ anomalio ja ofta ĉe tiu stranga animalo "supera", kiu estas la homo.

Mi same tute ne povas akcepti, ke nome de kolektiva homo (el la mito ĉi-supre citita), de moralo, de kutimo, k.s., la sociaj dispozicioj, en la manoj de registaroj, reĝoj, diktatoroj, princoj aŭ aliaj tribestroj el la kolektivo, alproprigu al si la "rajton" subigi, sklavigi la individuon ; kaj mutilado, kastrado, kanibalado, ks. estas nura detalo. Ĉi tie, kiel mi diris, la problemo estas esenca : ĉu akcepti regadon de kolektivo, ĉu malakcepti tiun regadon kaj agadi plene individue ?

Pri la anomalioj de la naturo, kaj "Laŭte!" oftege parolas pri ili : ekzemple la "gejoj", mi tute ne komprenas kial oni bezonas establi specialajn statutojn, rajtojn el kolektiva karaktero. Ke tiu, kiu preferas masklan pugon por sia peniso anstataŭ femalan vulvon, uzu pugon kaj fina punkto... sed vole-nevole temas pri anormala ago rilate al nia deveno, al la naturo. Homa mutilado, ankaŭ en festenoj, kiuj plaĉas al la Dioj, estas anomalioj kaj aberacioj rilate al la naturo, kiujn oni povas nur kondamni. Se ni ne kapablus tiun kondamnon fari, ni devus akcepti genocidojn el nazia karaktero... aŭ eĉ rekomendi kastradon por populacia kontrolo, kompreneble preter la konsidero al homa voluptemo. Ni ankaŭ ne forgesu, ke ĉiuj sensacoj, same la voluptaj kiel la suferaj, pasas tra niaj neŭronoj, kiuj estas en nia kapo, tiu homa parto, kiun oni ne bezonas mutili, por ke ĝi iĝu plene aliena.

ZAMENHOF-TAGO EN SUD-OKCIDENTA FRANCIO

La 14an kaj 15an de Decembro okazos en **Angulemo** la venonta renkontiĝo de la Esperantistoj de Sudokcidenta Francio. Estos tiam la Zamenhof-Tago kaj ni ŝatus fari festeton. Pro tio, ni ŝatus, ke la partoprenontoj skribu al ni por sendi siajn ideojn. Jam ni povas proponi, ke tiu renkontiĝo komenciĝu sabaton posttagmeze (ĉ. la 13a aŭ 16a horo). Eble, sabaton vespere ni povus akcepti grupon de tradicia muziko kaj danci (sed ni devos pagi ĉ. 30 FF por ĉiu persono). Ni povos ankaŭ prepari kukojn kaj manĝi ilin sabaton vespere.

(Plu legu pri tio sur paĝo 52 !)



VORTOJ DE MALJUNULO

valo

ĈE LA RIVERBORDO

Kelkaj junaj knaboj gapas al mi kaj flustras inter si. Fine bubo eliras el la rondo, venas rekte al mi kaj afable demandas : "Sinjoro, kiomaĝa vi estas ?"

Videble ili miris, ke tiel maljuna homo ankoraŭ naĝas kaj plonĝas en tiu malvarmeta akvo.

Mi respondis la demandon, kaj aldonis : "Junuloj, ne ĉesu veni al la riverbano, kaj kiam vi atingos mian nunan aĝon, ankaŭ vi povos ankoraŭ ĝui tiun plezuron."

Verdire, mi ne naĝas plu tiel longe kiel antaŭe, kaj mi ne plonĝas de kvinmetra alto, kio estis mia modesta persona rekordo. Miaj maljunaj kruroj rifuzas kuri, kaj mi antaŭsentas, ke baldaŭ la pulmoj kaj la koro rifuzos grimpadon sur krutaj montdeklivoj. Mi ne ludas tenison, ĉar mi ne vidas la flugantajn pilkojn. Mi legas tra lupeo, kaj aŭdas tra akustikaj aparatoj. Ĉiel la aĝo sin rememorigas per diversaj avertoj. Por mi, pri amorludoj jam longe ne temas. Tial mi povas nun sen dezirveko apreci la estetikon de belaj junaj najadoj kun aŭ sen mamzono, kiuj ludas ĉe la akvobordo aŭ prezentas sian fajnan haŭton al brunigaj sunradioj, antaŭ aŭ post la bano. Mia rigardo ne ĝenas ilin, ĉar ili plene konscias, ke ĝi ne estas rigardo de malĉasta maljunulo. Maljuna, jes, sed simple kaj senkomplekse.

Mi turnas min al junaj nuntempuloj. Gejunuloj, vi ne scias, kiom longe vi vivos. Tial plejbone uzu kaj ĝuu vian junecon, kaj tenu vin pretaj por eventuala maljuneco. Kiam ĝi venos, akceptu ĝin kune kun ĝiaj agrablaj kaj malagrablaj akompanoj, sed ne tro frue rezignu kaj rezignaci.

Ĉion ĉi mi jam diris lastajare en simila formo. Nu, indulgu la legontoj : oni scias ja, ke maljunuloj ofte ripetas gurditajn rediraĵojn.

PRI MALNOVA FOTO

Hieraŭ min vizitis samaĝa kamarado, kiu estis kunlernanto mia de la dek-tria jaro ĝis la dudek-unua. Dum pluraj horoj ni elvokis komunajn rememorojn el tiu fora tempo, kiu estis bela epoko por ni adoleskantoj, malgraŭ la premeĝa etoso de la granda milito.

Ni rigardis foton de grupo da kunlernantoj en j. 1918, redonis nomojn al la vizaĝoj. El 13, jam 5 estas mortintaj, 4 restis pli-malpli en rilatoj. Pri la kvar aliaj... "Jen Bertrando, bonega kunulo. Mi nenion komprenis, kial li malsukcesis en tiu konkurso por la Artoj*. - Ankaŭ mi ne komprenas. Li ja estis tiel kapabla kiel ĉiu el ni. Ĉu ci scias, kio li fariĝis? - Jes, li per konkurso enoficiĝis en la Poŝto, kaj li atingis sufiĉe altan gradon en tiu administracio. Iam mi vizitis lin en Liono, poste mi perdis lian spuron. - Kaj tiu ĉi, kaj tiu? - Mi ne scias."

Tiel la vivkirlado disigas plejbonajn kamaradojn. Pri unu el ili, li kaj mi forgesis eĉ lian nomon, kvankam ni tre bone memoras lian gajan vizaĝon kaj lian agrablan kompanion.

Kiam, transpasinte la okdekan jaron, oni elvokas tiujn velkintajn rememorojn, oni bedaŭras sian neglektemon kaj sian senzorgemon, kiu lasis malstreĉiĝi kaj fine tute fali la karajn interrilatojn de la plej bela periodo el sia vivo.

Tiuj kvar kamaradoj, ĉu ili ankoraŭ ie vivas? Ĉu ankaŭ ili mortis? Mi nenion scios...

Karaj junuloj, penu konservi la rilatojn kun la amikoj de via juneco. Kredu min: tiajn amikecojn vi ne facile retrovos.

Florako en Ceveno, 1985 08 17

VALO

* "Artoj kaj Metioj", alta teknika lernejo.

ANALIZA GRAMATIKO (7)

1-a fantazia vago for de la Fundamento

La Fundamento de Esperanto estas sankta por la esperantistoj; sed ĉio sankta estas tia nur por tiuj, kiuj ĝin sanktigis, kaj la homa naturo estas tia, ke plej ofte la sanktigintoj mem forgesas kaprice aŭ senkonscie siajn sanktaĵojn kaj sanktulojn, kaj tiel nia fidelularo, prave aŭ malprave, kun aŭ sen seriozaj motivoj, ŝancelas la Fundamentajn regulojn pri la genroj aŭ seksdistingiloj kaj pri la landnomoj.

Por teni la lingvan unuecon estis prudenta antaŭzorgo

deklari la Fundamenton netuŝebla; sed, el scienca vidpunkto, ĝi validas nur tiom, kiom la Fundamento plenumas kontentige ĉiujn necesajn kondiĉojn. Tio permesas al ni libere kaj objekte rigardi, en du artikoloj, la faktojn rilate al tiuj ĉi du punktoj.

La teknika progreso en la dudeka jarcento kaj la ĝeneraligita mongajna laborado de la virinoj ŝanĝis en la plej evoluintaj landoj la sociajn cirkonstancojn de la bela sekso, tiel, ke ĝi liberiĝis parte de la ekonomiaj katenoj, kio liberigis ĝin parte de la mensaj kaj stimulis ĝin postuli la samajn rajtojn, kiujn havas la viroj. Kompreneble. Sed, en la postulkriara tumulto, kelkaj virinoj konfuzis la terminojn egalrajteco kaj egaleco, kaj, por liberiĝi, imitante la virojn, kiuj ankaŭ ne estas liberaj, ili ekfumis kaj ekdrinkis kaj impete ili portis sian konfuzon sur la lingvan terenon, kvazaŭ la vortoj havus la magian povon fari ilin pli liberaj, kaj iuj nomis la "majstron" masklisto kaj forĵetis la distingan Fundamentan sufikson "-in", kiun ili konsideris apartiga, diskriminacia, kaj eknomis sin doktoro, kamarado, prezidanto, pentristo, aŭ ministro, kio nur povas krei konfuzojn, kaj aliaj inventis distingan sufikson por la viroj, eble kun la kompleksulina intenco malaltige egaligi la virojn al si, kvazaŭ ni ne estus jam sufiĉe malaltaj.

Feliĉe, -- sur tio baziĝas la feliĉo, la vivo, kaj ankaŭ multaj zorgoj --, estas fakto ne ŝanĝebla, ke la du seksoj estas malsamaj, kaj tion devas pli aŭ malpli vaste esprimi la lingvoj; kaj Esperanto evidente ne estas rilate al tio ĉi tre preciza, kaj lasas la inan sekson sur dua loko per la personaj pronomoj, ĉar oni inklinaĵas diri, ekzemple, "Se iu vokos, vi ne aŭdos lin", kaj oni ne povas uzi pronomon por distingi la virinojn kaj la virojn en pluralo, kaj la sola plurala pronomo ŝajnas derivita de la singulara vira.

Nu, artikolo de Michel Challulau en "Laŭte!" de sept.-okt. 1984, en kiu li proponis la sekse neŭtran pronomon "ĵi", sugestis al mi jenan simplan kaj plej kompletan spekulativan solvon ekster la Fundamento:

Personaj pronomoj

1-a persono.	Singularo.	Pluralo	3-a persono	Singularo.	Pluralo
	mi	ni	Sekse neŭtra por personoj,		
2-a persono.	vi	ivi	bestoj kaj eĉ okaze por la		
	ci	ici	"tria sekso".	ĵi	iĵi
			Por viroj kaj maskloj	li	ili
			Por virinoj kaj femaloj)	ŝi	iŝi
			Por plantoj kaj sekseksaj aĵoj	ĝi	iĝi
			Nedifina, sennombra, sekse		
			neŭtra	oni	oni

Ekzemploj :

Nek mi nek vi eniros en la katedralon, sed se vi, aŭ ivi, eniros, ivi vidos ke enestas multaj homoj, kaj ke iĵi estas apartigitaj per ekranu laŭ iĵia sekso, eĉ se iĵi estas geedzoj. Ili sidas sur la dekstra flanko de la centra navo ; iĵi sur la maldekstra. Estas du flankaj navoj, kaj la centra estas tre vasta. Ĝi estas trioble pli larĝa ol iĵi.

Kvankam "iĵi" estas infinitivo de verbo, kredeble neniam tio estus motivo de konfuzo, kaj tute forestus diskriminacio, ne nur pri la virinoj, sed ankaŭ pri la bestoj kaj pri "iĵia" sekso.

La enkonduko de la sekse neŭtra pronomo "ĵi", kaj la pluraligo de ĉiuj, escepte de "oni", pli akordaj kun la nuna epoko, povus kontentigi la feministinojn, simpligus iujn frazojn, prezentus neniun malfacilon kaj lasus la ĝisnunan uzon kiel arkaikan, sed same kompreneblan. Mi pledas nek por, nek kontraŭ. La personaj pronomoj bone funkcias, kaj, evidente Zamenhof ne malestimis la virinojn.

Aparte de la feminismaj depostuloj, rezultas inversefike reakcia la tendenco de iuj grupoj uzi inter kamaradoj nur la pronomon "ci" por la singularo de la dua persono, tial ke la universala, egaliga uzo de "vi" ekde la unuaj tempoj, kun rezervado de "ci" ekskluzive por literaturaj efektoj de persona supereco aŭ malsupereco (ne de egaleco), estas vere maldiskriminacia kaj demokratiiga.

L. Mimó

Por nia medito :

Fragmentoj el leteroj de E. LANTI

"...Via diagnozo pri mia spiritostato estas ĝusta : mi ja estas tre malsaĝa. Por esti feliĉa oni devus ne havi dezirojn ; tia estas la budaisma **nirvano**. Nu, mi jam nomis tion "senflugila flugemo" (Artikolo en "Tempo"). La solvo de Aspes kaj de Bubo estas pli logika kaj radikala(*). Superfluas, ke mi diru, ke via sciigo pri ĉi tiu lasta, simpatia K-do vere afliktas min. Kiam mi korespondis kun li, tiam mi penis instigi lin al lernado, pripensado, observado, ktp. Longajn leterojn mi skribis al li kaj mi opinias, ke ili estis el la plej legindaj. Sed ŝajne ili ne tre bonefikis sur la ricevinton. Cetere li mem ne respondis al mia lasta letero el Japanio. Eble mi pentris al li koncepton pri la vivo, kiu ne estis sufiĉe optimisma. Eble aliaj

faktoroj ankaŭ efikis. Ĉu ne estas iu virino en tiu dramo ? Mi ŝatus ekscii detale pri la tuta afero ; sed eble vi mem ne scias multon. Almenaŭ la sinmortigo de Aspes kaj de Bubo starigas filozofian kaj moralan problemon, malfacile solvotan. Kio savis min ĝis nun, tio eble estas mia emo moki kaj ironii. Komprenu, ke tion mi faras en momentoj, kiam fakte premas min pesimismo. Se la vivo estas granda tragedifarso sencela, nu, ni akcentu la farsan flankon. Sed la tuta afero estas eble nur simple, ke iuj havas pli da bolanta viv-energio ol aliaj. Unuvorte, ni ne scias... Kredu, ke mi mem ofte pensis ludi la lastan akton de la farso en la arbaro de Fontenblo. Mi konas lokojn, kie kadavro povas kviete putri dum monatoj, eble jaroj, ne estante vidata de homaj okuloj... .. Ridu, ridadu legante ĉi tion. La rido estas saniga ; almenaŭ Rabelezo asertis tion. Cetere, kiam oni ridegas, oni malpli malbele grimacas ol kiam oni ploras. Sed necesas ankaŭ esti plorinta por ĝui ridon ; same esti malsaniĝinta, por ĝui bonfarton. Amen..."

(* Ambaŭ sin mortigis.

(Letero de Majo 1939)

"En la **Vulgara Esperantisto*** (n-ro de marto 1939) troviĝas jena perlo : "La bazo de Esperanto estas la (substreko mia) naciaj lingvoj. Se ili ne ekzistus, ne povus naskiĝi ankaŭ Esperanto kiel internacia (sed ne "sennacieca"!) lingvo."

La bazo de nia lingvo ne estas la naciaj lingvoj, sed nur kelkaj, tre malmultaj el la 1500 ekzistantaj. La argumentmaniero de la redaktoro de la menciita gazeto estas vere el tre vulgara tipo sofisma. Kaj por montri al li, ke ankaŭ sennaciisto povus sofisme argumenti mi diru : "la bazo de l' nacioj estas la tero ; se ĝi ne ekzistus, ankaŭ ne povus ekzisti la nacioj. Sekve, la planedismo (sennaciismo) estas multe pli fundamentita ol la internaciismo."

Tia argumentmaniero senvaloras. La sennaciismo estas simple la konstato, ke ekzisto de nacioj havas kiel faktan rezulton, ke ĉiam milito ekzistas inter ili ĉu efektive ĉu latente. En nia epoko la nacioj estas vera pesto por la homaro. La racio postulas ilian malaperon kaj la starigon de mondregno.

Tial ke esp-o apartenas al neniun aparta popolo, al neniun nacio kaj estas destinita al la tuta mondo, ĝia ĉefa kvalito estas do la tutmondeco aŭ sennacieco. Kaj pro tio, ke per sistema aplikado de nia lingvo la homoj havas la eblon senigi sin je ĉia nacieco, ties profunda signifo, ties "interna ideo" estas do la sennaciismo.

Hitler estas tute prava, opiniante, ke la praktikado de tia lingvo povas nur difekti la naciecan senton ĉe ties uzantoj. Kaj nemalpli signifa estas la fakto, ke kiam Stalin komencis akcenti sian naciisman politikon, de tiam la esp-a movado en Sovetio statas tute same kiel en Germanio. Por pravigi mian aserton sufiĉu menci, ke I.P.E. devas likvidiĝi, kvankam ĝi ne estis, kiel SAT, malpermesita en Stalinio.

Por ke la legantoj ekvidu tute klare la sofisman argumentadon de la "Vulgara Esperantisto", mi krome faros jenan aserton : la franca, hispana, itala, portugala, rumana lingvoj ne estas naciecaj, ĉar iliaj radikoj plejparte originas el la mortinta latino, kiu ĝis la deksesa jarcento estis la komuna lingvo de ĉiuj kleruloj el Eŭropo."

(*) es. Redak. bv. atenti mian ortografion k ne pensi pri plumeraro.

("El la notlibro de Alfesto", 5.6.39)

[Pri **La Kvina Evangelio** de Han Riner, nun eldonita de SAT-Broŝurservo] "...ne temas pri libro, kiun oni legas rapide kaj nur unu fojon por distre pasigi la tempon. **La Kvina Evangelio** estas verko, kiun oni povas legi plurfoje kaj ĉiam kun profito por la intelekto. Unuvorte ĝi nepre indas troviĝi en la manoj de ĉiu homo, kiu deziras akiri memstaran penskapablon..."


(8.6.39)

"... Oni pruntedonis al mi "**Voĉoj de Oriento**" kaj denove mi atentigas vin pri la neceso ne ignori tiun gazeton. Ne kredu, ke mi simpatias al ĝi, sed tio ne estas motivo por ne recenzi, menci ĝin aŭ eĉ, eble plej trafe, represi lerte elektitan tekston. Sed bv. atenti ke **Redakcio** de la SAT-gazetoj laŭstatute ne rajtas havi difinitan politikan tendencon. Nur kiel individuo la Redaktoro aŭ iu ajn P.K.-ano rajtas eldiri sian politikan aŭ filozofian opinion. Per la almetita teksto vi konstatos, ke ankaŭ la ateismo ne devas esti la sola vidpunkto akceptata en SAT. Ekzistas **fanatikaj** bolŝevistoj, eĉ anarkistoj ; sekve ni ne facilanime kondamnu religiulojn. Ni ĉiuj lernu esti toleremaj."

(Letero de 12.6.39)

Noto de Kribo : Tiun lastan ekstrakton, kies signifo cetere tute parencas al tiu esprimita de Lanti en lia artikolo "**For la dogmojn...el SAT**" (El Verkoj de Lanti, vol.3, p. 31), mi, kun ia amara sento, dediĉas al la atento de neSAT-anoj, sed ankaŭ de SAT-anoj kaj eĉ de P.K.-anoj, kiuj povus havi pri vera "SAT-spirito" ne tute ĝustan vidpunkton.

KRUCVORTENIGMO proponita de P.S.



Horizontale :

- I. Labormalsano en Sovetunio.
- II. Dromedararo. Numeralo.
- III. Prefikso. Tapiŝo. Fiktiva mon-unuo.
- IV. Instrument'. Tiel kondukatas Etno.
- V. Li kultivis la florojn de l'Malbonio. Grupoj.
- VI. Bedaŭresprimo. Naturo. Fonetike : teniĝo.
- VII. Bestĝardeno. Rok' aŭ gland', depende de la legsenco.
- VIII. Aprobe. Informa.
- IX. Parolantaj solaj.
- X. Gen' de muskoj. Estul' kun voranta pasio al infanoj. En loko.
- XI. Brando. Glitilo.
- XII. Ĉiesa vojo al la vivo. Senprokraste.

Vértikale :

1. Tie naskiĝis multaj ĉefverkoj.
2. Arĝentaj moneroj por flavuloj. Alfluant' de Danubo.
3. Grup'. Ĝi estas ĝuste super via kapo.
4. Povus esti la totemo de la politikistaro. Daŭr'.
5. Monavideco. Turnu vin al la vento !
6. Senafekta. Raci'.
7. Azenkard'. Hejm' de praavoj.
8. Venksimbolo. Inverse: tabelpronomo.
9. Refleksivo. Inverse : alfundiĝo.
10. Plej altgrada ŝirm'.
11. Muzo de la memoro.
12. Krucumito kun la kapo malsupren. Marmovoj.

ATENTIGO : ĉe difino, kies ĉefvorto estas eliziita, la responda solvovorto estas nur radiko.

SOLVO DE LA KRUCVORTENIGMO de n-ro 61 :

- Horizontale** : 1. MEMORIGILO. 2. AKUZATIVON. 3. KS. OMAR. KK. 4. IKONO. OPAL. 5. ARKO. PSILO. 6. VEO. ARKEO. 7. EMPIRIO. NI. 8. LEONA PO. 9. IN. URSOREL. 10. STELAR. TRU. 11. MONOTONECO.
- Vertikale** : 1. MAKIAVELISM. 2. EKSKREMENTO. 3. MU. OKOPO. EN. 4. OZONO. INULO. 5. RAMO. ARARAT. 6. ITA. PRI. SRO. 7. GIROSKOPO. 8. IV. PIE. ORTE. 9. LOKALON. ERC. 10. ONKLO. IGLUO.

----- la enigmo-provizo estas elĉerpita ! -----

POLAJ GEPRELEGISTOJ

La Kultura Esperanta Centro, 72 avenue du Général de Gaulle, F 66000 PERPIGNAN, havos la ĝojon akcepti en oktobro 1985 du eminentajn polajn esperantistojn : S-inon ROSRAK Tamara kaj S-ron TYBLEWSKI.

Ĉiujn informojn donas la K.E.C. Tel: 68 34 22 18.

ĈIES VOĈO

KVADRATURE

La geometria konstruo prezentita en L! 60 estas bona praktika solvo : bona praktika, ne ekzakta. Ekzakta ne povas ekzisti, kara kvadraturisto, tio ne estas dogmo, t.e. rivelita "vero", kiun oni devas blinde kredi, sed ja pruvita vero, kiun ĉiu povas kontroli. Vi ne vere respondis al mia simpla argumento, jen ĝi denove. Se oni konsideras du poligonojn kun sama nombro da lateroj, unu internan, kies angulpunktoj situas sur la cirkonferenco, alian eksteran, kies lateroj ĝin tangentas, evidente la dua estas pli granda ol la unua, kaj la perimetro de la cirklo (cirkonferenco) kaj ĝia areo situas respektive inter tiuj de ambaŭ poligonoj. La perimetroj kaj la areoj de la du poligonoj estas mezureblaj kaj kalkul-eblaj en rilato kun la radiuso. Kiam oni multobligas la nombron de la lateroj, oni ricevas valorojn kun pli kaj pli da samaj decimaloj. Tiuj komunaj decimaloj estas ankaŭ validaj por la cirklo. Estas evidenta vero, ke la tri perimetroj kaj la tri areoj respektive neniam estas egalaj, kiom ajn ili interproksimiĝos. Tio ne estas subtila rezonado, sed simpla rigora konstato. Mi defias iun ajn ĝin prave refuti.

Nun pri la aritmetika interpreto prezentita en L! 61. Ĉe la bazo estas tiu aserto : "estas facile konstati, ke la latero de la kvadrato estas 7/10 de ĝia diagonalo", do 0,70. Nu, estas facile kalkuli laŭ la teoremo de Pitagoro, ke tiu rilato inter latero kaj diagonalo estas $\sqrt{2}/2 = 0,7070707...$ ktp senfine - do pli proksima de 0,71 ol de 0,72 (oni povas antaŭkoni la decimalon de n-a vico, ĉar se n estas malpara, ĝi estas 0, kaj se n estas para, ĝi estas 7). Sur tiu erara bazo la tuta sekvanta kalkulo, ĝuste farita, kondukas kompreneble al erara rezulto : $\pi = 3,1406$ aŭ pli precize 3,1405224. Ekde la tria decimalo tiu valoro ne ĝustas : ĝi estas ne 0, sed 1. Ĉiuj matematikistoj, kiuj kalkulis tiun valoron kun pli kaj pli da ekzaktaj decimaloj interkonsentas pri la sinsekvaj valoroj :

3
3,1
3,14
3,142
3,1416
3,14159
3,141593
3,1415926, ktp...

Oni kalkulis ĝin kun pli ol 700 ekzaktaj decimaloj. Male ol ĉe $\sqrt{2}/2$, ne estas eble antaŭkoni la valoron de iu decimalo de n-a vico, ĉar ili sinsekvas senorde, laŭ hazarde.

Nia simpatia kvadraturisto per senerara kalkulo surbaze de erara deirpunkto, ricevis eraran rezulton, tute kompreneble.

En tuta rigoro lia aritmetika kiel lia geometria "solvo" estas erara. Tio ne kontraŭdiras la fakton, ke lia solvo estas interesa kaj bona en praktiko.

Ĉar tiu diskutado povus fariĝi tiom senfine longa, kiom kalkulado de "ekzakta" valoro de π , mi rigardas ĝin de nun kiel praktike fermitan.

Neanonima Valo.

ABORTO = FALSA PROBLEMO

Unue mi volas diri, ke mi tute aprobas, ke oni forigis aborton el la punleĝaro de mia lando. Mi pensas, ke abortojn oni devas malplimultiigi, sed nepre ne per premado de virinoj plej ofte kompatindaj.

*Sed mi pensas, ke aborto estas falsa problemo, ĉar :
- plej ofte, ĝi estas la rezulto de neglekto de la kontraŭkoncipaj metodoj. Mi pensas, ke ĉiuj geknaboj, antaŭ ol ili atingos la aĝon seksumi (unuajn menstruojn mi mem havis, kiam mi estis nur 11-jara), devas havi plenan konon de la kontraŭkoncipaj metodoj inaj kaj viraj. Nu, la banaleco de aborto estas tia, ke multaj virinoj neglektas kontraŭkoncipajn metodojn pro la penso "se okazos akcidento, oni faros ĉion necesan". Kelkaj feministinoj fieras, ke ili abortis 2 aŭ 3-foje, kaj mi serioze demandas min, ĉu iuj el ili ne intence gravediĝas por povi aldoni plian aborton al la listo de siaj heroaĵoj.*

- la tuta propagando por aŭ kontraŭ aborto baziĝas sur la principo : virino naskas bebon = virino devas eduki infanon dum almenaŭ 18 jaroj. Nu, almenaŭ en Francio, iu ajn graveda virino povas akuŝi anonime kaj lasi la bebon en la naskejo, por adopto. Miloj da sterilaj paroj revas pri adopto de novnaskito kaj ne povas realigi tiun revon, ĉar preskaŭ ne estas adopteblaj novnaskitoj.

Se mi gravediĝus kontraŭ mia volo (pro forgeso de la pilolo), mi pensas, ke mia propra psiko eltenus pli facile

donacon de bebo al amonta paro, ol mortigon de embrio. Eble anonima akuŝo estas malbona solvo, eble ĝi estas malracia, malmorala, malrealigebla, ktp, ktp. Bone : sed kial pri tiu solvo ne eblas eĉ diskuti ? Inter la francinoj, kiuj legas "L!"-n, kioma proporcio konas la ekziston de la proceduro "accouche-ment sous X" ?

Jakelino Lépeix

EL LETERO DE NIA ISRAELA LEGANTO

"... Se mia memoro ne perfidas min, la Akademio de Esperanto jam proksimume antaŭ dudek jaroj decidis, per voĉdono de siaj membroj, definitive, pri la unusola ĝusta uzo de la pasivaj participoj, metante tiel (ŝajne!) finon al plurjara senfrukta disputo inter la itista (fundamenta) kaj atista (hereza) skolo, favore al la unua. Por meza esperantisto plene kaj senmanke sufiĉas la aŭtoritato de G. Waringhien, K. Kalocsay, R. Schwartz kaj I. Lapenna - pri ilia lingva kompetenteco nenia dubo povas ekesti. La abundo de la zamenhofaj citaĵoj en "Lingvo kaj vivo" kaj Plena analiza gramatiko konvinkas pri senrezerva akcepto de la itista koncepto. La argumentoj de la atistoj (plej germanoj kaj skandinavoj) baziĝas sur miskompreno kaj falsa analogio influita de la koncernaj nacilingvoj. Domaĝas ĉiu guto da inko malŝparita favore al la abortita lingva koncepto, logike neniel defendebla.

Tiom pli mirigas min la artikol-serioj de s-ano Mimó en "Laŭte!". Per fervoro inda al pli noblaj celoj, li strebas revivigi la "mortintan ĉevalon". Tiuj provoj kondamnitaj dekomence al plena fiasko, taŭgas nur por pligrandigi la konfuzon en la cerboj de la esperantistaro, grandparte ne sufiĉe sperta pri tiaspecaj lingvaj problemoj. Ĉu s-ano Mimo kaj liaj adeptoj celas altrudi al ni ĉiuj la pasivan pluskvamperfektan teorion, renversi la firme bazitan kategoriecon de la verboj - alivorte igi nin elŝiri el PAG kaj PIV la koncernajn paĝojn, kies enhavon ili deklaras erara ?

Mi tute ne kontraŭas prilingvajn artikolojn en organoj destinitaj por laikuloj, kondiĉe, ke la fina konkludo estu en la spirito de la Fundamento kaj konforme al la akademia linio. Se iu lingvisto malsamopiniis, li bonvolu turni sin al la malvasta rondo de la akademianoj, kaj pridiskuti kun ili la koncernan problemon ; se li restos izola kun sia opinio, li eltiru la konsekvencojn kaj akceptu laŭ demokratia maniero la verdikton de la plimulto.

Estas netolereble, ke sojle de la centjara jubileo de nia lingvo, estu ajna necerteco pri la lingva unueco, pro reform-

emaj tendencoj ankoraŭ ne ĉesigitaj. Laŭ mia opinio "Laŭte!" devus meti finon al aperigo de polemikaj artikoloj defiantaj la oficiale sanktigitajn decidojn de la Akademio...."

Teddy Löwenkopf

Kelkaj vortoj de la redaktanto-tajpanto-balaanto de "L!" : "hereza"... "sanktigitaj decidoj"... ? Eble. Sed principo de "L!" estas, ke en ĝi neniu temo estas tabuo kaj tion devus kompreni ĉiu "laŭtulo". Eĉ se, kiel ĉiu ajn esp-isto, mi havas proprajn lingvajn kutimojn aŭ preferojn, kiel tajpanto-balaanto (mi insistas pri "balaanto", ĉar nur pri tio mi vere kompetentas), mi silentigas tiujn preferojn. Krome, mi konfesas, ke ne malplaĉas al mi, se en la paĝoj de L! povas sin esprimi ĉies vidpunktoj, kaj aparte la "herezaj", kiujn oni forpelis "demokratie" el aliaj gazetoj. Se demokratio konsistas en tio, ke plimulto pretendas trudi ion al malplimulto - la plej banala okazo! - mi supozeble ne same opinias kiel amiko Teddy Löwenkopf. Kaj - ĉar en L! nenio estas tabuo (eĉ la "principo", ke neniu temo estas tabuo!), mi dankas amikon T.L. pro la ĉi-supre esprimita opinio.

KLARIGOJ pri la noto de S-ano VALO en L! num. 61

En sia noto nia amiko povis konfuzi la legantojn, ĉar li volis diri "Nu, kio estas grado?", ne kvalito, ĉar al grado respondas la difino "kvanto, kiun oni ankoraŭ ne scias mezuri" Ankaŭ per sia diro ke mi persistas "post la klara respondo de Waringhien", ĉar tian ĉi tiu nek donis nek donos rilate al tiuj frazoj, kiuj povas havi signifon manieran aŭ gradan, laŭ la adverbo, kiuj konsistigas la gordian nodon de la demando.

Ĉiu "inventita regulo", ĉu ĝusta, ĉu erara, ekzistas. Valo ne montras ke tiu mia estas erara, eĉ ekagnoskas ĝin prava, sed postulas liberon pri la uzo de la lingvo. Mi nek volas, nek havas povon trudi ion, aŭ limigi ies liberon. Ĉiu povas libere erari, sed mi, kiel ĉiuj, rajtas kaj devas libere nomi la erarojn eraroj. Ja "ĝusta" kaj "erara" ne estas afero de gustoj aŭ nuancoj, sed de rezonado, kaj mi amas raciajn, ne svagajn metafizikajn argumentojn.

L. Mimó

ĈU HAZARDE ?

Hieraŭ mi ricevis L! 59 kaj L! 60 kiel nurajn donacojn je mia 75a datreveno. Diktatore la bultenoj devigis min al legado kaj sekve mi solvis la krucvortenigmojn. Lastnokte mi relegis la verkaĵojn en la per-ĉenletera rubriko. Je la sesa (laŭ fervoj-horloĝo) la vekhorloĝo kvazaŭ per la F.P.-kanto el-litigis min kun la decido verki artikolon pri la nuna temo en tiu rubriko. En marto mi vizitis tri Komunumojn (Communauté de l'Arche) en francio por ekkoni la vivetoson tiean. Malgraŭ ke mi estas nereligulo (ne havas dion),

oni min plej amike akceptis kaj mi spertis, ke la vivmaniero en tiuj komunumoj plene harmonias kun la ideoj de neperforta aktiveco. La temo en L! 60 estas por mi dua koincido.

En aŭtuno 1984 sesopo el Belgio kaj Nederlando ekloĝis en forlasita konventejo por fondi en ĝi komunumon laŭ neperforta vivmaniero. Kreiĝis movado nomita Amikoj de Arkeo, kiu aĉetis la domegon kun la granda ĝardeno kaj per tio helpas efektiviĝi la fondiĝon de la Arkeo-komunumo en Nederlando.

Jen traduko de la komencaj vortoj el la informfolio de tiu nova komunumo : "Ni volas vivi laŭ ĉi maniero, ĉar en ĉiu tago estas rerimarkebla,... ke pro tio ni restas sanaj kaj gajhumoraj ; ... ke pro tio ni fariĝas malpli dependaj ; ... ke ĝi donas laboron plejproksiman al nia ĉiutaga vivo ; ... ke ĝi ne kaŭzas malŝparadon kaj polucion ; ... ke ĝi estas vivmaniero, kiu de ĉiuj en la tuta mondo por ĉiam povas esti aplikata. Ĉar ni volas vivi laŭ maniero, kiu havas estontecon kaj kiu ebligas bonfarton al ĉiu".

Per futuran-pensado al inda homsoci'. Socia transformiĝo samtempe okazu kun individua transformiĝo ! Krom tio la transformiĝo estu ne nur materia, sed ankaŭ samtempe spirita. Ne necesas krei novan verdan religion, nur akcepti la koheran evoluon de ĉies spirito. Jen vojo al solvo.

Tiu solvo ne estu esotera. Ĝi estu ekzotera kaj ĉie sur nia planedo ekestu komunumoj, en kiuj oni apliku harmonian vivadon laŭ suprenomita maniero. En praktiko solvi neperfortan aktivecon. Nova paradigmo kreas naturan defendon, kiu ne estas komparebla kun perforta defendinstitucio. Per nova pensŝablono alvoko al ĉiu individuo por partopreni en eduko al planeda defendspirito.

19850508, iea iu.

SAKRE !

La artikolo de Michel Challulau en L! 61 estas interesa kaj utila. Sed atentu ! En la elekto kaj uzado de sakraĵoj konvenas esti singardema. Ne pro pudoro, fulmotondro ! La pruduloj fermu siajn okulojn, ŝtopu siajn orelojn kaj pinĉu sian nazon ! Sed pro internacieco. Challulau prave rimarkis, ke ekster Franclingvio la ĉarma vorto "piĉo" ne estus komprenata kiel sinonimo de "stultulo". Tial en la fino de mia libreto "Kontraŭflue", citante la fortan vorton de Prévert "Quelle connerie, la guerre!", mi tradukis (logike kaj, mi konfesas, sensuke) per : "Kia stultegaĵo, la milito !".

Challulau diris : "Kio povas esti pli senvalora ol merdo ?" Nu, por ĉinaj kamparanoj homa merdo estas plej altvalora sterko. Jam kelkaj ĉinaj kamparanoj estas esperantistoj, kaj esperinde ili baldaŭ multiĝos. Do ?

Same pri nomoj de animaloj. El franclingva buŝo "bovino" aŭ "kamel" estas malŝataj. Sed en Hindio bovino estas res-

pektigata sankta estaĵo, kaj en afrikaj kaj orientaj landoj kamelo estas ŝatinda kunulo de la homo. Ĉu vere azeno estas malinteligenta ? Kaj tiu simpatia porko, tiom malŝatata de judoj, muzulmanoj kaj okcidentanoj, kial ?

Same bestaj nomoj kiel fekaj esprimoj, tradicie krudaj en naciaj lingvoj, estu en Esperanto manipolataj kun delikata zorgo, se ni volas esti de ĉiuj komprenataj. Tiu neceso limigas liberan uzon de sakraĵoj, sed feliĉe nia lingvo posedas latentajn eblojn, ankoraŭ nemulte esploritajn. Challulau indikas kelkajn aperturojn al tiu fekunda vojo. El tiu parto de lia artikolo ni povas plenmane ĉerpi. Kaj mi plene aliĝas al la "senutila" aldono de Kribo.

Valo

PRI SAKRAĴOJ

- Kiel sakri en E ? Putinbordelaĉan fektruon ! Ne pŭas kompreni kiel oni faras tiel kakan demandon !... Misfikantoj !

Tiu interesa artikolo pensigis min... kaj mi alvenis al du konkludoj :

- 1) E estas viva lingvo, kaj natura.
- 2) Lingvaĵoj kiel slango, scienca ĵargono, ktp, estas ne partoj de lingvo, sed transformaĵoj de tiu lingvo.

1 - Esperanto estas natura lingvo, ĉar ĝi funkcias kiel naturaj lingvoj. Objektive, E estas Eŭropa unuigita kaj reformita lingvo. T.e., ke Zamenhof faris el eŭropaj lingvoj la samon kiel oni faris al naciaj lingvoj : oni reformis la francan, la italan, la rusan, ktp... kaj oni forigis la regionajn t.n. lingvaĉojn. Sed estis du diferencoj :

- la naciaj lingvoj estis reformitaj laŭ centra lingvo, dum en Esperanto ne estas ĉefa devena lingvo, nur la latinida lingvogrupo.

- la naciaj lingvaj reformoj estis trude aplikataj, dum Esperanto emas al konvinkiĝo de la homoj.

Konsekvence, Esperanto havas la strukturon de reformita natura lingvo, ne tiun de artefarita lingvo.

"Bordelo" estas kruda vorto, ĉar estas lingvoj, en kiuj ĝi estas tia. Tio ne eblas kun tute artefarita lingvo, en kiu vortoj estas nur arbitraj silabaroj.

2 - Lingvaĵoj ne estas partoj de lingvoj, sed transformoj.

Ili ne uzas la saman gramatikon, nek la saman vortaron, kiuj estas transformataj. Oni ne sakras EN Esperanto, sed PER Esperanto. Esperanto ne estis kreita por sakri. Se

serĉas edzinon. Li havas bonajn salajron kaj apartamenton, sed li iom lamas. Je la deziro helpi al li, mi demandis al Ilda, ĉu ŝi konas konvenan personon por li ; kaj Ilda proponis vin.

- Mi estas fianĉiniĝinta.

- Mi scias, tamen Ilda rimarkigis, ke via fianĉiĝo daŭras jam tro longe, ke ĝi eble ne kondukos al edziĝo, ke estas pli bone rezigni pri ĝi. Tial mi ne povis rifuzi la proponon. Kial akcepti aliulinon kaj vin ne ? Tio estus ofendo por vi kaj senrevigo por Ilda. Aliflanke ĝuste vi povus esti la taŭga edzino por Alberto, ĉar li postulas nur bonan personon, kiu amos lin kaj kiun li amos. Ĉu klare ?

- Klare.

- Ilda asertis, ke ŝi same agis, kiam ŝi estis de longe fianĉino kaj renkontiĝis kun Armando. Ŝi lasis la fianĉon kaj akceptis Armandon kiel edzon.

- Ĉu vi kredas al ŝi ? Estis la fianĉo kiu lasis Ilda-n, ne Ilda la fianĉon.

Kaj meditante laŭtvoĉe :

- Alberto estas pedelo, ne kamparano kiel mia fianĉo. Li havas apartamenton kaj estas pedelo... sed li lamas. Jen, al ne plu sufiĉe junaj fraŭlinoj la sorto proponas : aŭ edziniĝi kun vidvo aŭ kun invalido...

- Pro kio vi ankoraŭ ne edziniĝis kun via fianĉo ?

- Ĉar li estas kamparano kaj mi ne volas labori kiel kamparanino. Mi atendas, ke li fariĝos laboristo ĉe iu ajn entrepreno.. Aliflanke... mi ne havas grandan dispozicion por la edziniĝo. Mi ĉiam timas tiun paŝon. Nun lasi mian fianĉon por rekomenci kun alia viro, estus afero tro malagraba, ĉar mi devus denove peni por konatiĝi kaj harmonii kun eventuala edzo... Male, Ilda tute supraĵe kriis al mi : "Preparu, preparu rapide la dokumentojn por la baldaŭa edziniĝo kun Alberto!"

Anna aldonas kelkajn vortojn, kiujn mi ne aŭdas, ĉar alkuras Ilda, kun bela, ruĝa, grasa, timmoviĝanta kuniklo, kaj klarigas :

- Mia patro pagis min per tiu ĉi kuniklo la riparon de la ŝuoj riparitaj de mia edzo. Ni tuj mortigu ĝin por ke la "Fraŭlino"* portu ĝin aŭtomobile al mia hejmo !

- Prenu la tranĉilon! - ekkrias la virinoj unu al la alia.

Aŭdante la vorton "tranĉilo", mi eksentas teruron ; kaj svarmegas en mian cerbon pensoj kaj konsideroj : "Tiu mal-feliĉa kuniklo, ĝuste ĉar ĝi estas kuniklo, devas esti mortigata dum mi, ĝuste ĉar mi ne estas kuniklo, rajtas rigardi kaj ĝui la naturon. Krome, mi devas atendi la plenumon de tiu fiago, bone sciante ke ĝi dume okazas. Ho, mi ne restos inerta ! Mi provos eviti la mortigon, almenaŭ en la tempo de mia

* "Fraŭlino" = mi

ĉeesto !

Tuj mi petas, eĉ minacas, laŭtvoĉe :

- Ne, ne, ne faru ! Mi fuĝos, se vi fiagos !

Ĉar neniu atentis min, mi eniras en mian aŭtomobilon kaj mi vere ekfuĝas.

Sed mi haltas post kelkaj metroj. Laŭtaj krioj alvenas al mi akompanataj de vortoj, kies signifon mi ne perceptas. Verŝajne temas pri insultoj de Ilda al mi kaj mi vokas ŝin. La knabeto respondas :

- Venu ! Ni ne mortigos la kuniklon !

Mi alproksimiĝas piede kaj vidas Ilda-n sidanta kaj grumblanta kun mallevita kapo : "Porca zozza, porca zozza" ŝi ripetadas.

- Ilda! - mi alvokas.

Ŝi respondas kolera :

- Vi kapricis, mi ne venos. Mia frato, kiam li rehejmeniĝos el la fabriko, kunportos min al la urbo.

Mi restas senspira. Kiamaniere finiĝos la afero ?

Kaj jen, tute ne atendite, Ilda leviĝas kaj diras :

- Ni iru !

En la aŭtomobilo ŝi parolas pri propra doloro :

- Pro via reago, mi restis sen la kuniklo !

- Ĉu vi ne mortigis ĝin ?

- Ne !

- Pro kio vi kriaĉis kontraŭ mi ?

- Mi ne kriaĉis kontraŭ vi.

- Kontraŭ kiu vi kriaĉis ?

- Kontraŭ la porkulino, nome kontraŭ la edzino de mia patro.

- Kion vi diris ?

- Porca zozza, porca zozza !

- Kial ?

- Ĉar ŝi batis la manojn, kiam vi fuĝis kaj, ĝojante pro la ŝparo, ŝi remetis la kuniklon en la kaĝon. Ŝi eĉ diris al mi, ke por la patro la riparo de la ŝuoj ne estas pagenda.

- Pro kio vi kriaĉis kontraŭ ŝi kaj ne kontraŭ mi ?

- Pro kio mi krii kontraŭ vi ?

- Ĉar mi kaŭzis tiun perdon. Sed... komprenu min, Ilda! Mi ne povis agi alie. Kiam mi aŭdis, ke vi buĉos la kuniklon, mi ekteruriĝis. Kial vi ne buĉis ĝin senbrue, malantaŭ la korto ? Mi sciis nenion kaj senĝene mi portus aŭtomobile la kuniklon. Kial vi kriaĉis : "La tranĉilo, la tranĉilo" ? Mi ne povis toleri la sciigon pri la mortigo de la besto ! Mi estas malsana je la nervoj. Mi fariĝis eĉ pli delikata kaj sentema !

- Eĉ sen malsano, vi agus same... estas en via karaktero

kompati la bestojn.

Mi miras, ke Ilda, malgraŭ sia neklereco, tiom bone pen-
tras min. Ŝi tute ne riproĉas min. Tamen alia maltrankviligo
kaptas min : mi konscias pri la perdo de Ilda. Mi savis la
kuniklon, sed mi senigis ŝin de tiu havaĵo, de la pago por la
riparitaj ŝuoj. Ja Arturo ne donis monon.

- Ilda, - mi diras - mi estas la kulpulino, ne via duonpatrino.
Vi restis sen la kuniklo pro mi. Via duonpatrino simple profi-
tis la okazon de mia ribelo. Eble en sia koro ŝi primokis min,
tamen ŝi ne volis preterpasi la eblecon kontentigi min por
ŝpari la kuniklon.

- La porca zozza !

- Jes. Tamen ne ŝi, nur mi malaperigis la kuniklon de viaj
manoj.

- Ne ! Nur ŝi, kiu prenis kaj remetis la beston en la kaĝon
por plikreskigi ĝin kaj ĝin manĝi kun la sektanoj de la
religio, al kiu ŝi kaj mia patro aniĝis.

- Nu, aŭskultu ! Imagu ke vi metis la kuniklon en ĉambron kaj
ke mi lasis la pordon de la ĉambro malfermita, tiel ke la
kuniklo povis fuĝi.

Ilda rigardas min mirigite.

- Jes, estas tiel...sed...

- Vidu! Mi devas pagi la kuniklon.

- Ho, mia edzo tute ne permesus !

- Vi ne rakontos al via edzo pri la kuniklo. Vi diros al li, ke
via patro pagis dek mil lirojn por la laboro.

... kaj mi tiel manipulas per vortoj, ke fine Ilda prenas
mian monbileton, la duoblon de la valoro de la kuniklo.

- La porca zozza triumfis... kiamaniere solvi ankaŭ tiun
aferon ?

- Pardonu kaj forgesu por la bona Dio !

*

Mi elirigas Ilda-n el la aŭtomobilo en proksimeco de ŝia
domo kaj mi direktiĝas al la kamparo, nun jam periferio de
la urbo, por saluti mian kamparanan amikino Adela. Mi sen-
tas min kontenta, ĉar mi plilongigis la vivon de la kuniklo.
Ne nur tio. Mi pagis la perdon al Ilda. Lastatempe mi ne
dormis. Mi vekiĝis dum la nokto, nigraj pensoj atakis min kaj
mi devis ellitiĝi tre frue por kvietigi min per laboro.
Kial angori pro la mortigo de la kuniklo kaj pro la perdo de
Ilda ? Laŭ mi dek mil liroj estis konvena prezo por tiu ĉi
rezulto.

Kiam mi atingas Adela-n por la adiaŭo okaze de mia vo-
jaĝo al Międzygôrze, ŝi invitas min vespermanĝi kaj dormi

en ŝia hejmo.

- Via filo ankoraŭ ne forveturis al Afriko. Vi ne havas, do,
liton por mi !

- Ne pensu pri tio ! Mi ĵus hodiaŭ ŝanĝis la littukojn de mia
lito. Mia edzo dormos sur la divano kaj vi kun mi.

*

Tiel estis. Dum la nokto mi vekiĝis, sed pro la proksimeco
de Adela mi ree dormis. Ja, mi estis lacega pro la multaj
preskaŭ sendormaj noktoj. Matene, antaŭ la disiĝo, Adela
donacis al mi saketon kun tomatoj kaj botelon kun vino. Kaj
mi ĉion distribuis al Ilda, al frato, al najbarino. Mi fakte
devis vojaĝi. Mi ne povus uzi ilin por mi.

Unu mano lavas la alian. Ambaŭ manoj lavas la vizaĝon.

Lina Gabrielli

Maljunulo rakontas :

INVENTAĴOJ

Iun tagon, tre honorinda esperantista sinjoro deklaris :
"Esperanto estas inventita afero". Per ĉi tiuj vortoj li volis
diri, ke "nur frenezaj homoj povas inventi ion".

Tamen li ĉiutage uzas inventitajn aferojn : loĝejojn el
betono, brakhorloĝon, telefonon, televidon, fervojon, la poŝ-
ton, elektran lumon, medikamentojn, puran akvon varman aŭ
malvarman per krano, fridkeston, alumetojn kaj aliajn sen-
nombrajn aferojn de nia ĉiutaga vivo... nia komforto.

Neniam mi legis, ke li bedaŭras pri sia deklaro.

Per ĉi tiuj linioj mi volas memori aferojn, pri kiuj li
eble neniam repensis...

Iun matenon, iu sinjoro vekiĝinte vidis sur la blanka muro,
vid-al-vide de kovrita fenestro, la monumenton de la placo
antaŭ sia domo... sed inverse, ĉar antaŭ la kovrilo de la fenes-
tro brilis jam la suno, kreante tra malgranda truon en la kovri-
lo ĉi tiun bildon.

Tiu fakto donis al li la ideon : "Se mi anstataŭigus la monu-
menton per iu homo kaj kovrus la muron per kupra aŭ arĝen-
ta lado, mi kreus "bildon"... foton..de ĉi tiu homo".

Li petis "patenton" kaj Napoleono mem aĉetis la patenton
por ĝin donaci al la popolo.

Ĉar oni bezonis resti senmova 15 minutojn en brila suno
por fari "fotoportreton", multaj aliaj esploristoj malkovris
aliajn faradojn per kemiaj agoj... ĝis estis eble mallongigi la
tempon de "lumado" al 1/16 de sekundo. Sekve, Sinjoro Melies
kaj poste Sinjoro Lumière... kreis post la jam granda industrio

de foto... la "kinon".

Ĉi tiu industrio de kino fariĝis ankoraŭ pli granda ol industrio de foto, kreante milojn kaj milojn da novaj laboreblecoj. Kaj ĉi tiu kreis aliajn novajn eblecojn... la "televidon"... Kaj hodiaŭ oni vidas kun 1/20...de sekundo da malfruiĝo tion, kio okazas en Ameriko.

*

La invento de vapormaŝino (la vaporŝipo), kiu mallongigis la veturon de Eŭropo al Ameriko de 3 monatoj al unu semajno...

La oleolumon anstataŭis petrolo kaj gaso kaj elektra lumo..

La fervojo, reduktante la daŭron de veturo per ĉevaloj al 1/50, baldaŭ ebligas (per tunelo) vojaĝi de Francio al Anglio en dek minutoj...

*

La aviadilo ebligas iri kaj reveni de Parizo al Rio de Janeiro aŭ de Parizo al Los Anĝeles inter mateno kaj vespero de la sama tago. Ne necesas doni aliajn ekzemplojn.

Oni neniam povas antaŭvidi aŭ antaŭdiri pri la alveno de Esperanto.

Antaŭ 6000 jaroj iu "homo" sin deklaris filo de Dio... Kaj aliaj antaŭ 2000 kaj 1600 jaroj... Vidu hodiaŭ iliajn adeptojn... Ili estas miliardoj. Ĉu oni povis ĉi tion antaŭdiri aŭ antaŭdiri ?

Eble Esperanto atingos la saman sukceson. **Pro tio ni devas daŭrigi nian agadon !**

-nn-

ZAMENHOF-TAGO EN SUD-OKCIDENTA FRANCIO

(Daŭrigo de p. 32)

Ni eble povos fari malgrandan ekspozicion kaj inviti personojn, kiuj ne ankoraŭ estas esperantistoj.

Se vi povos kunporti lumbildojn pri vojaĝo en eksterlando, estos bone. Ni eble havos lumbildojn pri la renkontiĝo organizita de ICEM-Esperanto, kiu okazis en Jugoslavio.

Do, se vi havas ideojn aliajn, bonvolu skribi al ni :

Christian LEDUC aŭ Régine BARTHET

App. 25

32 Bld. Jean Moulin, Ma Campagne

16000 ANGOULEME

Ni tre amike dankas vin kaj diras al vi : Ĝis la venonta renkontiĝo en nia urbo !

Ni forgesis diri al vi, ke se vi muzikas, ne forgesu kunporti vian muzikilon.

DEKLARACIO DE LA 58a KONGRESO DE S.A.T.

La 58a Kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda, kiu okazis de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1985 en Amersfoort, Nederlando, kun partoprenantoj el 15 landoj, aprobis jenan Deklaracion :

La Kongreso konstatas :

- ke dum la t.n. "Jaro de la Komunikado" neniu registaro vere favoris justan kaj racian solvon de la problemo de rekta lingva komunikado ;
- ke, malgraŭ la abundo en la plej riĉaj landoj, ne estis eble, pro diversaj egoismoj, organizi efikan distribuadon kaj memstaran produktadon de nutraĵoj en regionoj, kie regas malsato ;
- ke la vetarmado inter la regantaj blokoj bremsas, kaj eĉ retroigas mondscale la socian progreson ;
- ke subpremado kaj ekspluatado trovas potencon apogon en diversaj formoj de rasismo kaj maltoleremo ;
- ke malegaleco kaj diskriminacio kaŭzas strebadon al memstareco kaj kondukas al malfacile elireblaj konfliktoj ;
- ke spite al ĉies rajtoj pri laboro kaj ekonomia memstareco, homoj estas krude metitaj en humiligajn situaciojn de senlaboreco kaj mizero, eĉ en la plej riĉaj socioj.

La Kongreso opinias,

- ke nur akcepto de sennacieca lingvo forigos la lingvan ĥaoson kaj evitos grandan malŝparon ; esperanto pruviĝis por tio la plej vivkapabla kaj taŭga solvo ;
- ke forigo de ekspluatado kaj akcelo de baza formado al adaptitaj agrikulturaj, industriaj kaj transportaj teknikoj helpas survoje al venko super malsato ;
- ke ĉesigo de vetarmado kaj plikreskigo de la translimaj kontaktoj envojiĝos procezon, kiu paŝon post paŝo permesos krei situacion, en kiu la militoj ne plu estos neeviteblaj ;
- ke edukado devas forigi la bazojn de subpremado kaj ekspluatado, kiaj estas rasismo kaj maltoleremo ;
- ke ekonomia kaj socia samrajtecoj estas nemankipovaj ;
- ke edukado kaj instruado devas esti direktitaj al akcepto de justa divido de la laboro kaj de ties produktaĵoj.

* SAT, 67 av. Gambetta, F-75020 PARIS

Nota - La partoprenintoj de tiu ĉi kongreso apartenis al 13 lingvaj zonoj. Ĉinio estis reprezentita unuafoje. La 59a kongreso de SAT okazos en Sant Cugat del Valles (Barcelono, Hispanio) kaj la 60a principe en Krakovo (Pollando) okaze de la centjariĝo de esperanto, en 1987.

INTERNACIA KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO

Sekve de amasĉeestata publika kunveno, en la kadro de la 70-a Universala Kongreso de Esperanto, en aŭgusto, 1985, en Aŭgsburgo, ekzistas faka asocio por kampo longe neglektata, tiu de komercaj rilatoj kaj ekonomiaj interŝanĝoj.

Sub la prezido de S-ro F.J. Braun, kun S-ro L. Mee kiel Sekretario, pli ol tridek interesitoj el dek-duo da landoj diskutis proponitan agadprogramon kiel ekzistokialon por faka asocio, kaj proponitan Statuton kiel organizobazon.

Ambaŭ proponaroj trovis entuziasman akcepton, kun plibonigoj proponitaj el propraj spertoj de partoprenantoj.

La kunveno re-formiĝis por esti kunsido de Membroj kun rajto de voĉdonado. Tiu kunveno tiam adoptis per akklamado la Statuton, kaj tiu ago donis juran ekzisto-raĵton al :

Internacia komerca kaj Ekonomia Fakgrupo

Sub la gvido de S-ro H. Welling, Membro de IKEF, la nova asocio, laŭ-Statute, Estraron konsistantan el kvin individuaj Membroj. La Estraro konsistas el:
S-ro F.J. Braun (Ok. Germanio), Prezidanto ;
S-ro L. Mee (Nederlando), Ĝenerala Sekretario ;
D-ro M. Picasso (Italio), Estrarano ;
S-ro F. X. Gilbert (Francio), Estrarano kaj
D-ro I. Gether (Hungario), Estrarano.

Kopioj de la Statuto, kaj ceteraj informoj pri la agadprogramo kaj -planoj de la Fakgrupo, estas haveblaj kontraŭ simpla peto al la konstanta adreso de la Fakgrupo.

Inter la konstatitaj urĝaj taskoj por la Fakgrupo estas tiu de kunordigo de la aperigo de fakaj artikoloj pri la ekonomia situacio en apartaj landoj, cele al granda plioftigo de tiaj artikoloj. La Fakgrupo aparte serĉas kontaktojn kun verkontoj, promesante fakan helpon laŭpove.

En la komerca kampo, la Fakgrupo jam starigis la bazon de 'peradservo', ebligante kontaktojn inter tiuj kiuj 'proponas' kaj tiuj, kiuj 'serĉas', varojn de ĉiu speco. Potencaj uzontoj de tia peradservo estas simile konsilataj sin turni al la konstanta adreso kun helpopeto.

Ankaŭ en la komerca kampo, la Estraro esploras la eblecojn plioftigi reprezentadon de Esperantistoj en specimenfoiroj, kaj aparte bonvenigus proponojn tiurilatajn.

Rotterdam
1985-08-07

Lawrence Mee,
Ĝenerala Sekretario.

Tiuj, kiujn interesas rilatoj inter la lingvoj de etnaj minoritatoj kaj la internacia lingvo ESPERANTO, povas sin turni al :

Internacia Komitato por etnaj liberecoj (I.K.E.L.)

Uwe Joachim MORITZ, Im. r merfeld 44, D 5180 Eschweiler (F.R.Germanio)

NI DECIDIĜU

Genevi ve COSTE

La laboro koncernas la tutan naturon, ĉiujn leĝojn de la mondo, ĉiujn ties fortojn : tiun de la roko senmova, tiun de l'akvo boranta, de l'vento levanta, de l'tondroŝtormo fulmofrapanta. La laboro luktas kontraŭ l'inercio kaj ĝin uzas : oni konstruas turojn, oni faligas riveregojn.

La laboro disvolviĝas ĉe la limoj inter vivo kaj morto : ĝi bredas la bestojn, ilin multobligas, nutras, buĉas. La laboro sekvas la tutan evoluon de l'estaĵoj : domo estas neniam finita, ĉar la unua pluvo formovas la tegolojn, la unua vento fortpuŝas ŝutron ; kaj ĉiu momento de senlaca lukto inter la disharmoniaj formoj kaj fortoj okazigas iun laboron, estas uzata de iu laboro.

Tial, la laboro ne finiĝas kiam estas efektivigita la plano. Versailles /versaj/ estis dekfoje rekonstruata de post Mansart /m sar/, kaj ĉiu el la malnovaj, el la novaj domoj en kiuj ni vivas, tiel estas senĉese rearanĝata, restarigata, subfortikigata. La difektiĝo ne atendas, kaj la laboro estas tie, en la kreskanta domo kaj en la ruiniĝanta, en la nova vojo kaj en la fendoplena.

Kunestante en ĉiuj formoj, ĝi ankaŭ uzas ĉiujn fortojn ; ĝi povas konstrui, ĝi povas detrui. Enestas tiom da laboro en la bombo, kiom en la malsanulejo.

Ke la laboro estas ĉie, ke ĝi sekvas la movojn de la naturo laŭ ĉiuj iliaj fleksiĝoj, ke ĝi aktivigas ĉe ĉiu direktoŝanĝo de tio kreskanta kaj tio malaperanta, malmulte probable, ke la laboristaro tion ne sciis. Same kiel ili scias, ke la fortoj de l'mondo, tiuj kiuj starigas la montojn, kreskigas la arbarojn, kaj tiuj kiuj erodas, premeegas, fordetruas montojn kaj arbarojn, ne estas la efektivigo de iu brila programo.

Jen temas pri malvarmaj evidentaĵoj. Ilia nefleksebla funkciado neniel interesiĝas pri nia entuziasmo nek en niaj naŭziĝoj, kaj iu ora epoko, kiu transformus la universon en mirindan, senfine oleumitan meĥanisman, en kiu nenio foruziĝus, malaperus, rompiĝus, eskapus la homajn programojn, estas sufiĉe ridinda revaĵo por la laborantoj.

Tamen, nia epoko ŝajne havigas al la laboro la rigidecon kaj la limojn de plano. La scienca kaj teĥnika ekipo ebligas mondscale disdoni la taskojn. La komunik- kaj informrimedoj, per siaj densiĝintaj retoj, projekcias la kompleksajn

bezontabelojn, la kreskokurbojn, la ekspluatkampojn de l' riĉofontoj, la demografiajn etapojn, la fluktukurbojn de l' produktado, de l'konsumado. Ili sintezigas ilin laŭforme de grandegaj modelprojektoj, t.n. "prikreskaj".

Laŭgrade, dum tiuj modeloj ellaboratas, la laboro kaj ĝiaj efektivaĵoj eniras la skemojn de plikreskinta potenco.

Kun la maŝinoj kiuj kirlas kolosajn informkvantojn, la maŝinoj kiuj redistribuas ilin, kun la preskriboj pri kreskado, la scio kaj la inteligenteco de la organizantoj tute fandiĝas kun ilia povo. Oni elpensas maŝinojn por maŝinigi ; oni agas por agi. Ne plu temas pri regado de homoj : temas tutsimple pri regado de la naturo, kun malpli kaj malpli da alvokoj al homoj.

Ne temas pri kreado de utilaj posedaĵoj. Temas pri eluzigo de ia ajn posedaĵoj, kies nura avantaĝo estas respondi al normoj de pliaj rapideco, produkt- kaj vari-kapablo, sen reuzebleco.

La energio, t.e. la bruta forto sendependa de ĉia apliko, pravigas la ekziston de tiuj efektivaĵoj, kiuj ĝin multobligas elĉerpante la naturon. Tiu sisteme planata agado estas nomata "naturregado", "progreso", "evoluigo", "plialtigo de l'vivnivelo", laŭplaĉe.

Regado, progreso, evoluigo, plialtigo, ĉar ni superas ? Tiu superado estas fiktiva.

La matematikaj, teĥnikaj, ekonomiaj modeloj povas certigi al ni kreskantajn produktadon kaj konsumadon. Tiuj modeloj estas falsaj, ĉar ili esprimas nur duonon de la realo.

Duonon de la realo : kreskon, konstruon, evoluigon, spruĉadon de formoj.

Duonon de la realo : detruon, malaperon, forsvenadon kaj morton.

Tiuj modeloj estas falsaj, ĉar la vojoj dissulkiĝas, la pontoj disfalas, la domegoj diserigiĝas, la fabrikoj eksplodas, la ŝipoj balanciĝas kaj dronas, kaj ĉar tiuj faktoj ne estas akcidentoj : tiuj faktoj estas la duono de la realo, ili signas ke ĉia faritaĵo duobliĝas per sia malfariĝo, ke ĉia fabrikitaĵo funkcias detruigante, ke ĉia efektivaĵo de la homa laboro apenaŭ ekaperinte lamas, kaj senfine necesigas aliajn kaj plu aliajn riparojn kaj korektojn.

Tiuj modeloj estas falsaj, ĉar tiuj, kiuj elpensas ilin, ne bezonas vivi por ilin elformi. Teorie, altefikaj teĥnikistoj povas fabriki maŝinojn, kiuj ilin relaksos por konstrui, fabriki evoluigi. Sed nek io nek iu bezonas ilin relaksi por detru,

diserigi, forsvenigi, malkunmeti, foruzi, fandi kaj kunfandi, kaj anstataŭigi la objektojn kaj la estaĵojn per la elementa magmo.

En la intima ligo inter la senlime kompleksaj faktoroj de la moderna laboro, ligo inter scienca kaj teĥnika esplorado, inter ekipo kaj produktelekto, distribuo, konsumo ; ligo ankaŭ inter la sociaj strukturoj kaj la homaj grupoj ; ligoj ebligataj de komputilo, telekomunikoj, merkatumstudo, ekbateriigo de la esplorsistemoj, ŝajnas realiĝi iu pli kaj pli kohera tuto, en kiu ĉiu decido enhavas maksimumajn necescon kaj efikecon.

Sed tiu kohereco estas tiu de l'potenco. La unueco instaligiĝas profite al vakua energio, al la povo, ne al la ago.

"Ni povas fari ĉion kion ni volas", klamas la potencaj sciencistoj-teĥnikistoj. Ne, certe. Ili volas ĉion, kion ili povas, sen escepto, kaj sen iu lumo sur tiun parton de la realo, kiu ne estas potenco.

Ĉie, kie estas foruzo, diserigiĝo, disiĝo en polvon, rubaĵojn kaj detranĉaĵojn, la potenco estas tenata for, ĝi ne plu rolas ne plu havas ian signifon.

Tial, tiu eksterordinara teĥnika integrado, mem intensiĝante, amasigas ĉirkaŭ sin, ĉirkaŭ nin, la muregon de la mortintaĵoj. Ĝi nin ĉirkaŭas per putraĵoj, nin ĉirkaŭfermas per rubaĵoj, kaj jen videble altiĝas, ĉirkaŭ ni, la kolosa rubaĵamaso, kiun ĝi elĵetas kaj ignoras.

La motoroj plirapidiĝas, plipotenciĝas, kaj la azota oksido la azota dioksido, la ozono kiuj formiĝas en ĉeesto de hidrokarbidoj sub efiko de l'sunaj ultraviolaj radioj, senĉesa malkunmetiĝo, envolvas nian atmosferon en venenan vualon.

Ju pli rapida la motoro, pli grandaj la fabrikoj, pli vastaj kaj larĝaj la vojoj, pli riĉaj la industrioj, pli rapidaj la konsumado kaj la renovigo de l'objektoj, des pli larĝe disvastiĝas, ĉe l'fundo de l'maroj, tiu lago de bitumo kie krevas la fiŝoj, kien amasiĝas, finitaj kaj nuligitaj, la generacioj de nenombreblaj specioj.

Ju pli grandaj la urboj, pli lumigitaj la montrofenestroj, pli abundaj kaj opulentaj la manĝoj, des pli majestas, ĉu sternitaj en ŝtonminejoj, ĉu odoraĉe forbruligataj, okupantaj la teron kaj la aeron, - la rubaĵoj.

La fluo de la sensalaj akvoj kiu lavas la teron kaj propagas la vivon estas haltigita kaj stokigita. Sed la valoj estas ŝtonaĉplenaj kavaĵoj, la arboj, la bestoj estas mortintaj. Kaj la elektra potenco, super la tersurfaco, krucas sian kunpremeĝitan reton da altensiliniaj koridoroj, da miliar-

doj da kilovattoj sencelaj, senformaj kaj senagaj, senlace pelataj en la muelilon de la potenco, de la forto, de l' potenco, de l'potenco, plu kaj plu...

Sube, sur miloj da kvadrataj kilometroj : vegetaĵaro estingiĝas, bestoj kaj homoj fuĝas de sterila, mortinta tero.

Kaj la atomrubaĵaro, ne konfesata, amasiĝas, rubaĵtipo de kiu oni sin fortunigas kun aŭdaca senĝeneco apenaŭ ĝin demetinte, en iun malklaretan angulon. Neniu el la potencularoj kiuj ĝin demetas sur la teron kuraĝas diri de kie tio venas, kio tio estas, kio tio fariĝos. Sed fluaĵo da retoriko kaj nekontroleblaj kalkuloj, dolĉaĉaj protestoj, kunkulpoj kaj interesiĝoj, tiom malaltaj aŭ tiom fiaj, ke la profitantoj ne kuraĝas ilin konfesi al si mem, jen estas la pudorvualo, kiun etendas la potenco sur siajn restaĵojn.

Ĉar la potenco ja estas fieraj, unubloka, absolute nekunpremebla, senrevena kaj senbedaŭra.

Kion ĝi diras ? "La putraĵo iras al la putraĵo, la mortintoj enterigas la mortintojn, la ruino akomodigiĝas al la ruinaĵoj, kaj antaŭen trans la tombojn ! Cetere, tion ni ne plu priparolu. Ĉia putraĵo estas nekonvena ; la rubaĵo ne povas kontraŭdiri la nekontesteblan purecon de nia nerezistebla ekflugo."

Tamen la laboro ne fuĝas antaŭ la putriĝo, nek antaŭ la rubaĵoj. La laboro estas la ago de l'homo kiu frontas eĉ la Aŭgiasajn stalojn. La laboro ne timas la morton, ne hontas pro la ruino, ne ŝtopas sian nazon antaŭ la malpuraĵo. Ĉar la laboro ne kreas potencon, ĝi kreas inteligentecon.

Oni konstruas domon, ĝin riparas, ĝin refaras. Kiam ĝi tute foruziĝis, oni reprenas la ŝtonojn kaj ili denove utilas.

La laboro ne foruzas : ĝi renovigas. Ĝi ne kaŝas : ĝi relokas. Ĝi fosas la havenojn, elprenas la ŝlimon. Ĝi fortranĉas la arbarojn, replantas la arbarojn. Ĝi sekvas en la naturo ĉiujn transformiĝojn de l'estaĵoj, el kiuj neniu fremdas al ĝi. Morto, foruziĝo, ripozo, diseriĝo, malapero, malforteco, ne tabuas por la laboro.

Ekzistas laboroj nomataj lavi, seninfektigi, sanigi, dreni ; laboroj nomataj gardi, protekti, konservi, refari, kaj pliaj laboroj, kies nomoj estas kulturaj, kuraci, naskigi, helpi al morto, mortinton vindi, privigli.

En rilato kun ĉiu realaĵo ignorata de la potenco, ekzistas iu laboro. Tie, kie la sciencaj modeloj, kie la plej "pintaj" teknikoj misas kaj tiel superensvenas en nubon da fumo, tie kie superverŝiĝas la rubaĵoj, kie la gaso venenas, kie la grundo sekigiĝas kaj mortas, tie estas homoj, kiuj

laboras, seninfektigas, purigas, portas kadavrojn kaj enterigas la mortintojn.

Tie, kie la potenco promesas, post iu kolosa katastrofo (cent aŭ ducent mortintoj, bruligitaj kaj venenitaj, hieraŭ, en Hindujo ?), ke "tio estas bona leciono, ke oni de nun agos pli bone, ke la vojo al la potenco, foje sursemita de penaj travivaĵoj, devas esti supren laŭirata de la kuraĝa homaro, kiu ne povus tro altkoste pagi sciencan eksperimenton, ktp", tie kie la potenco parolas, promesas, ĵuras, el la plejprofundo de sia laboratorio, ke tio ne ree okazos, dume, la laboro estas surloke, ĝi protektas, defendas kion oni povas defendi, ĝi helpas, ĝi servas, nun. Ne ekzistas "venontfoje" por la laboro, ekzistas : tuj.

Tiuj, kiuj laboras, scias ke la laboro ne estas ambicio : ĝi estas realaĵo ; ke labori ne estas promesi : ĝi estas fari ; ne imagi, sed vidi ; ne ordoni, sed kompreni.

Tiuj, kiuj laboras, scias ke, kie regas la potenco, kie ĝi decidas absolute, pli rapide, pli multe, kie ĝi ŝaŭmigas siajn briletantajn energibezonojn, tie ne estas laboro. Tie estas la mania ripeto de stereotipo, la superregado de la forto super l'inteligenteco, iuspeca senbrila kermeso kun la ŝildo : "Ĉe l'Eterna Forgeso".

Nek pasinta, nek nuna, nek estonta tempo, en la kermeso de l'forgeso.

Nek vivantoj, nek mortintoj, en la kermeso de l'potenco.

Unuvorte, la laboro havas celon, la potenco ne.

Tiu, kiu laboras, scias, kion li volas. Tiu, kiu potencas, volas ion ajn, kondiĉe ke li tion povu.

Ĉu li luktas por ĝi, ĉu li ĝin konkeris, la libereco de tiu, kiu laboras, estas lia, ĉar li laboras.

Sed la potenco ne bezonas liberecon. Ĝi posedas ĉion, farante nenion. Por kio libereco ? Ĝi sin adoras en sia superagema nenifarado. Premi butonon, tio estas tute same lanĉi aviadilon, plugi kampon, ekfunkciigi orkestron, eksplodigi bombon. La potenco havas nur unu ilon : la elektronikan kontaktigilon, nur unu laboron : ĝin tuŝeti.

Kaj tiel la potenco havas nek lokon, nek signifon, nek ideon, nek ĉeeston, nek ion ajn en la duono de la realo.

La duono ja estas tro bela porcio. Ĝi estas nenio en 9/10, en 99/100 el la realo.

Tiu, kiu laboras, havas lokon en ĉiuj aferoj. Kie oni trovas nek superregadon, nek potencon, estas tie, ankoraŭ tie, ĉefe tie, la laboro.

Do, kiam necesas ideoj kaj volo, ni turnu nin al tiuj kiuj kapablas havi da ili : al tiuj, kiuj laboras.

Kiu subskribos akton deklarantan, ke la energio estas produktata por servi la homojn, ne la homoj por konsumi energion ?

Certe ne la direktantaro de E.D.F.* nek de C.E.A.*.

Kiu sin deklaras garantianto, ke la armiloj estas faritaj por ke oni mem batalu, se necesos, ne gajnu monon bataligante la aliajn ?

Certe ne la diplomatoj nek la inĝenieroj de Ruelle*.

Kiu asertos, ke l'atomenergio dezertigas la kamparojn, kreskigas la labormankon, plilarĝigas la fosaĵon inter la kategorioj de laborantoj, definitive kaj nekompenseble steriligas vastegajn regionojn de l'terglobo, robotigas la imagpovon, praktikas sur la tutan socion tiun hontindan ĉantaĝon : elektro aŭ vivo ?

Certe ne la C.G.T.*

Tio tamen devas esti dirata de realaj estuloj, de personoj, kiuj volas tion diri kaj povas tion diri, ĉar ili scias, ke tio estas vera.

Tio estos dirata de tiuj kiuj laboras, tiuj kiujn oni nomas la laboristoj.

Antikva afero, la ĵuro de Hipokrato.

Je la IV-a jarcento a.K., la laboro kaj la maŝinoj kiuj atakis la naturon apenaŭ skrapetis ĝin. La vivo de la tero, ĝiaj ekvilibro kaj katastrofoj nenion ŝuldis al la homa interveno. La nura teĥniko, kiu povis profunde trafi la vivon, kiu povis same kulturi kaj detrui, estis la teĥniko de l'kuracisto. Praktikisto pri la drogoj kaj kirurgiaj iloj, al kies gesto sendefende prezentigis la korpojn de l'homoj, kiujn li kuracis, li povis uzi la suferon por kvietigi, li povis rezigni parton de la korpo por ĉi-lastan resanigi. Sed lia povo estis samtempe tiu pri vivo kaj morto. Li povis veneni ; li povis mortigi.

Tiel, unufoje, iu laboro, la kuraca laboro, postulis de la laboristo, la kuracisto, ke li disigu sian potencon de sia volo. La kuracisto ne estas timiga sorĉisto. Li estas servisto de l'vivo, kiun li kulturas.

Hodiaŭ, ĉiuj teĥnikoj, metioj, havas sur la tutan naturon la potencon kiun nur la kuracisto havis sur la korpon, je l'epoko de Hipokrato. Hodiaŭ, laboristo en kemia fabriko, dungito en laboratorio, subĉefo, hejtisto en atomenergia fabriko, tenas en siaj manoj la povon ataki,

malkunmeti, detrui, mortigi en la naturo la profundajn radikojn de l'estaĵoj. Ĉiuj, kiuj hodiaŭ laboras, disponas, pere de la teknologiaj strukturoj, rekte je viv- kaj mort-povo.

Hodiaŭ, ĉiuj laborantoj faras (aŭ devus fari) al si la demandon kiun nur la kuracistoj antaŭe faris al si : ĉu ni estos la sorĉistoj aŭ la kuracistoj de la naturo ? Ĉu ni ĝin galvanizos kaj dispecigos por spektakligi al ni tiun gravecon, aŭ ĉu ni servos ĉi tiun teron, kiel ĝi nin servas ? kuracos tiun, ne senfinan teron, kiu bezonas esti protektata ĉar ĝi donas al ni sian propran forton, kun la vivo kaj la realeco de la vivo ?

La ĵuro de Hipokrato signifas : mi elektis celon. Mi faros ne ĉion, kion mi povas fari.

Sed ĝi signifas ankaŭ : mi sola decidas. Nek io nek iu povas trudi al mi tiun aŭ tiun uzon de mia potenco.

Ĵuro, tio estas sinligado kiun, fronte al nur ni mem, ni devigas nin plu teni. La ĵuro de la laboranto signifas ke la laboro potencas, kaj ke la laboristo scias kion li volas.

Hodiaŭ kiel antaŭe, nur la volo de tiuj, kiuj povas, kapablas doni celon kaj signifon al ilia povo.

Nur la individua decido, kiun neniu povas perforti, kapablas fari el la teĥnika potenco iun vivigilon por la planedo kaj la homoj. La ebriceco de la potenco, kiu sin kredas senlima ĉar ĝi blindas, forvaporigos antaŭ tiuj, kiuj senĉese malkovras ĝiajn limojn kaj fiaskojn ; tiu, kiu, ĉiufoje kun propraj riskoj kaj danĝeroj, esploras tiujn limojn, tiu ne estas la potenc-homo, tiu estas la labor-homo.

Se iu subskribos ĉi tiujn justicajn deklarojn, tiu estos unuavice tiu, kiu laboras.

TIU DO SUBSKRIBU !

* E.D.F. : "Electricité de France", societo reganta en Francio ĉion rilatantan al elektro.

C.E.A. : "Commissariat à l'énergie atomique", kiu respondecas (!) pri atomenergiaj aferoj en Francio.

Ruelle : franca urbo fama pro kanonfabriko.

C.G.T. : "Confédération Générale des Travailleurs", la plej potenca franca laborista sindikato.

LA SUBSKRIBINTOJ DE LA KODOJ konsistigas renkontiĝon de personoj, reton kies ekzistokialo estas aserti ke :

Geneviève COSTE

- scienca esplorado, medicina esplorado, informagadoj, ĉiuforma laboro, necese enhavas moralan econ.

* Subskribi tiujn kodojn estas deklari ke tiuj laboroj povas esti ĝuste plenumataj nur de individuoj kiuj volas servi la aliajn,

ke, libere kaj propravole, tiuj kiuj plenumas ilin devas rifuzi igi sian laboron rimedo por manipuli la vivon kaj la penson de la individuoj kiuj bezonas iliajn servojn.

La renkontiĝo de tiuj opinioj estas destinita ne krei iun forton sen manifesti juĝon,

- manifesti ankaŭ ke, postulante moralan respondecon de la individuoj mem en sia metio aŭ laboro, oni ne esprimas utopian aŭ frivolan penson.

Tiu opinio rekte rilatas kun la ekzisto mem de la homaj socioj. Ĝi deklaras ke tiu, kiu servigas sian metion al timo, krueleco aŭ malestimo, tute ne plenumas sian metion.

Ni petas ĉiun leginton de tiuj kodoj legigi ilin al ĉiuj samopiniantaj personoj.

Ricevinte tiujn subskribojn, ĉu pri unu, ĉu pri pluraj, ĉu pri ĉiuj, ni konatigos la opiniojn de ili esprimatajn al la eminentuloj de la scienca, medicina kaj profesia medioj.

Iliaj respondoj konsistigos ateston pri la realaj fortoj en niaj socioj agantaj.

Tiuj respondoj estos publikigitaj kaj fine ĝisdatigos tiel ĝeneralan kaj klaran opinionon, ke ili efike kontraŭstaros la nenombreblajn suferojn kiujn trudas la homoj al la aliaj homoj kiam ili uzas sian scion por erarigi, la komunikadon por mensogi, kaj la laboron por subpremi.

KOMUNIKO DE LA KOMITATO DE SAT-JUNULFAKO

Kara amikino, kara amiko !!!

Laŭ la eksterordinara demandado farita antaŭ kelkaj monatoj, montriĝas, ke ĵi-gazeto estas eldonebla, eldoninda. Ni do decidis provi kaj fiksas la daton por la unua numero komence de 1986. Celante po unu numero jare por komenco, ni esperas ke tiu gazeto aŭ revuo vivos per viaj diversaj kontribuajoj. Verku artikolojn pri iu ajn temo. Laŭ la demandado : pacmovado, kontraŭmilitarismo, edukaj temoj, ekologio, homaj rajtoj, junularo sen laboro, estas temoj, kiuj interesas ĵifanojn. Ili jam estas bazoj por debatoj. Sed ili ne estas limoj. Skribu, kion vi deziras.

Vi devas trovi en nia gazeto ĉion, kion vi postulas de junulara gazeto.

Sendu informojn. Ĉar la presado okazos komence de 1986, ni eble povus eldoni kalendaron pri la diversaj kongresoj, renkontiĝoj aŭ festivaloj... okazontaj venontjare.

Sendu artikolojn, desegnojn aŭ krucvorttenigmojn... al :

Marcel Redoulez, 11 rue René Descartes, F 33150 CENON

Mi deziras bonan cerbumadon kaj atendas baldaŭan respondon. Amike, Marcel Redoulez

La 21a **KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO** okazos de la 31a de oktobro ĝis la 3a de novembro 1985 en urbo St Cugat del Vallès (apud Barcelono). Eksterlandanoj aliĝas senpage. Por la gejunuloj la Urbeŝtraro proponas senpage tranoktadon ĉe la municipa domo "CASA MONACO", str. Canovas Castillo, 50. Kunportu dormsakon. Petu informojn al : 21a Kataluna Kongreso de Esperanto, Apartat 336, St Cugat des Vallès, (Vallès occidental), Katalunio (Hispanio).

Aperis la dua eldono de "**NUDPIEDA GEN**" de Nakazawa Keizi Gratulojn al "Rondo Gen" (inter kiuj cetere troviĝas bonaj geamikoj de L!): Al novuloj, kiuj ĵus ekpaŝas en Esperantio, al la malnovuloj, kiuj ve mistrafis la unuan eldonon de tiu nepre leginda, kontraŭmilita bildlibro 284-paĝa, unika, L! varme rekomendas la akiron. Prezo : 2200 enoj.

Per afablaj vortoj **LA KANCERKLINIKO** [J. Le Puil, 5 Pl. Lavoisier (61) F 93380 Pierrefitte] konsilas al sia abonantaro legi pri "skatologio" la art. "Kiel sakri en E" de M. Challulau. Dankon! Ve, estas elĉerpita la n-ro 61 de

L!, en kiu ĝi aperis. Gelegantoj de L!, kiuj siaflanke deziras posedi la tre legindajn n-rojn de LKK antaŭ ol ili same elĉerpiĝos, urĝe sin turnu al la ĉi-supre menciita adreso. Kaj tok! ni resendas la lifton! L!

OFERTO EKSTERORDINARA !

Aparte ni reduktis la prezojn de jenaj libroj :

Trigroŝa Romano, BRECHT Bert anstataŭ 22.00, nur 7.50 DM
 La perdita honoro de iu Katarina Blum, BÖLL Heinrich, anstataŭ 14.00 nur 5.00 DM

Ambaŭ libroj estas tolbinditaj !

Jus hodiaŭ (16.07.85) diskonigi la sciigo, ke Heinrich Böll mortis. Li estis unu el la plej progresemaĵoj verkistoj germanlingvaj. La perdita honoro de iu Katarina Blum estis unu el liaj ĉefverkoj. Ĝi traktas historion de honesta virino, kiun polico kaj precipe sensaciavida bulvarda gazetaro pelas al psika ruiniĝo kaj elsociiĝo.

NOVA ! Resonoj de Hubert Heinzierl (prezidanto de la germana ligo por Natur- kaj Mediprotektado "BUND"). Formato 19 x 21 cm ; amplekso 64 paĝoj kun 27 koloraj bildoj ; celofanita librokovrilo ; bindita. Aperis fine de julio 1985. Prezo : 22.80 DM + sendkostoj.

Tiu ĉi belaranĝe ilustrita kaj reprezenta verko provokas ĉiun trafolumi, legi kaj enpensiĝi. Vortoj kelkfoje verdire sarkasmaj evidentigas la problemojn en la naturo hodiaŭ kaj morgaŭ. Okulojn de la rigardanto freŝigas en plaĉe agrabla maniero la koloraj bildoj zorge elektitaj. Jen libro, pere de kiu vi povas igi multan ĝojon al vi kaj al viaj geamikoj - ekscelenta donacaĵo por ĉiu ajn.

Distribuas : Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj, Renneroder Str. 22 * D-6230 Frankfurt am Main 80

LA CENTA DATREVENO DE ESPERANTO

La E-istoj de la E-Centro AUBE, kunvenintaj en ĝenerala asembleo la 1-6.1985, plezure konstatas, ke E. festos sian centjaran jubileon en 1987 kaj ke tiu persisteco estas, en si mem, granda sukceso, kaj nepre konfirmas la valoron de nia internacia lingvo,

- opinias, ke tiu jubileo estas taŭga okazo por pli bone konigi E-on kaj doni al la E-movado novan impulson,
- sed konstatas, ke bedaŭrinde, la E-istoj estas proporcie tre malmultaj, ke la ĉeestantaro de la E-aranĝoj malofte superas centon,
- konscias, ke en la nuna tempo nur impona manifestacio povas atentigi la amasinformrimedojn kaj la publikajn instancoj, nepre kondiĉo de sukceso, insiste petas :

- 1) kunlaboron de ĉiuj asocioj,
- 2) instigon de ĉiuj E-istoj al respektivaj asocioj por organizi komunan festegon kiu allogos ankaŭ la neesperantistojn, ĉefe la gejunulojn.

La ESPERANTO-PIEDMIGRADO (1/6. Julio) organizita de la E-fako de Laika amikaro en EYSINES, kadre de la "Chemins"-asocio, okazis en agrabla kaj simpatia etoso en la Eŭropa Vilaĝo LE POUGET (Lozère) Partoprenis 7 neesperantistoj kaj 6 E-istoj (el ili 2 italinaj).

Martine kaj Hans kore akceptis nin en LE POUGET, kie gejunula taĉmento laboris por renovigi la vilaĝon. Roger Lagrave bone gvidis nin kaj per siaj bele diritaj rakontoj sciis malkovrigi al ni tiun mirindan regionon beligitan de multnombraj koloraj floroj.

Senĉese ni marĉadis malkovrante tiujn malnovajn vilaĝojn : ekzemple La Garde Guérin (survoje Rigordane), L'Habitarelle, Villespare, l'Hôpital, ktp... Ni iris ĝis la Tarn-fontoj.

Kamaradoj de La Canourgue vizitis nin. Ni kunportis E-informilojn, kiuj interesis niajn neesperantistajn amikojn.

Kontentaj pri tiu piedmigrada renkonto, ni intencas denove organizi alian, venontan jaron. GINETTE G.

FAMILIAJ E-KLUBOJ POR CENTJARIĜO DE ESPERANTO!

Por omaĝi centjariĝon de la internacia lingvo, membroj de la familio Worsztynowicz fondis familian Esperanto-klubon. Ĝis la jubilea jaro 1987 ili intencas atingi nombron de 100 familianoj flue parolantaj Esperanton.

La familio Worsztynowicz kompilas detalan genealogion de sia gento. Ĝia gentopatro estis la muelisto Tomaso Orsztyń / Worsztyn /, kiu en 1746 loksidigis en la urbo Gostyń / ĉ. 80 km sude de Poznań /. Probable li venis el la okcidenta Eŭropo kaj lia originala nomo povis esti Ornstein aŭ Wornstein, jam en 1761 aldoniĝis al lia nomo la finaĵo "-owicz".

En la 19a jarcento la familia nomo estis ofte mise skribata kaj nuntempe diversaj branĉoj de tiu familio nomiĝas : Worsztynowicz, Bursztynowicz, Orsztynowicz, Ostynowicz / Vorŝtinoviĉ, Burŝtinoviĉ, Orŝtinoviĉ, Ostinoviĉ/. Ĉiuj personoj kun tiuj nomoj vivantaj ie ajn en la mondo estas idoj de la muelisto Tomaso. Se loĝas ankaŭ en via regiono kontaktigu ilin kun la familio en Pollando. Sur genealogiaj tabeloj estas registritaj ankaŭ idoj en inaj linioj, tial multaj familianoj portas aliajn nomojn, tamen ĉiujn ligas deveno de la komuna gentopatro.

Ĉiujare multaj membroj de tiu gento partoprenas la Familian Fariadon "Esperanto hejme" en Międzyzgorze (en 1983 - 25 personoj, en 1984 - 40 personoj) kaj jam pli ol 50 familianoj konas aŭ lernas la internacian lingvon. En junio 1984 Eleonora Worsztynowicz prezentis ĉe la Universitato de Poznań disertacion pri Esperantaj bibliotekoj.

Nuntempe vivas ĉ. 4000 posteuloj de Tomaso apartenantaj al la sesa ĝis deka generacioj. Ili loĝas ĉefe en Pollando, sed ankaŭ en multaj aliaj landoj (Aŭstralio, Britio, Francio, FRG, GDR, Kanado, Usono k.a.). Personoj, kies antaŭuloj ĉ. 1900 elmigris el Pollando, plejparte ne konas la polan lingvon.

Ĉu ie en la mondo ekzistas familioj, kiuj kompilas siajn genealogiojn kaj

intencas fondi familiajn Esperanto-Klubojn ? La familio Worsztynowicz volonte renkontiĝos en Międzygórze kun ili. Adreso : Familio Worsztynowicz, P.O. Kesto 311, PL 50-950 Wrocław 2, Pollando.

LA "FALSBARBULOJ" KAJ LA BELULINO

Ĉiutage la gazetoj raportas pri **Greenpeace**, tiu asocio, kies ŝipo estis dronigita per du bomboj en novzelanda haveno. Kiu kulpas ? El diversaj hipotezoj, la plej probabla ŝajnas esti tiu de novzelandanoj, kiuj forte suspektas francajn ĝespionojn.

En Francio kiel en aliaj landoj, neniu, almenaŭ malkaŝe, aprobas tiun kriman agon (ni ne forgesu, ke en tiu afero mortis homo). Sed iom post iom, koncerne **Greenpeace**, la publika opinio, influate de la gazetaro kaj la televido, evoluas.

Tiuj ekologianoj estis simpatiaj, kiam ili defendis la balenojn aŭ la fokidojn kontraŭ sovaĝa ĉasado kaj amasbuĉado. Sed kiam ili pretendas defendi la homojn kontraŭ la danĝerego de nukleaj bomboj, halt ! Tiam ili atencas al la suvereneco de Francio.

Kaj ni aŭdas oficialajn deklarojn, favore akceptitajn de multaj civitanoj : "Francio ne povas toleri, ke iu ajn pretendu dikti al ĝi ĝiajn decidojn rilate al la nacia defendo."

"Francio", kiu estas ?

Ĉu S-ro Hernu, ministro de la armeoj ? Ĉu ĉefministro Fabius ? Ĉu prezidento Mitterrand ? Aŭ la "falsbarbuloj", kiuj agis eble el propra iniciato, kiel bonaj patriotoj, eble pro obeo al desupra ordono ?

En multaj francaj urbodomoj, la franca respubliko estas reprezentata per busto kun la ĉarma vizaĝo kaj la belaj manoj de Brigitte Bardot. Oni scias, ke post glora kariero de kinostelo, ŝi nun kuraĝe luktas kontraŭ la ekstermado de fokbeboj. Mi dubas, ĉu ŝi aprobus la fabrikadon, la provadon kaj la eventualan uzadon de homekstermaj kaj naturdetruaj nuklearmiloj.

Sed B.B. ne estas "Francio".

Bedaŭrinde.

Valo.

PROKSIMIĜAS LA JARFINO,
EBLE LA FINO DE VIA ABONO AL L!...

Por faciligi vian reabonon, abonon de konat(in)o,
aŭ mendo de broŝuroj, jen ĉi-kune "abonilo/mendilo"



tro malpeza akuzativo...

3 personoj por nia granda festo...
Ne estas sukcesego... Bedaŭrinde...

Malgraŭ nia propagando...
Bedaŭrinde...

Mi ne komprenas kial Paŭla ne venis...


Jes... ŝi demandis al mi kie ĝi okazos...



Sed ĉu ŝi jam ricevis ĝin ?

Ne, ĉar ŝi ankoraŭ NE PAGIS sian kotizon.

Sed mi respondis, ke tio estas skribita en la bulteno...



PRI LA EVOLUO DE L! kaj de ĝia abonprezo en 1986/1987

Ĉar unuflanke la diversaj kostoj (papero, inko, aŭfranko...) ne multe sed senĉese plialtiĝas ĉiujare (ĵen banalaĵo, ĉu ne?)...

...ĉar aliflanke "**Laŭte!**" nun orientiĝas al aperigo de pli kaj pli da duoblaj numeroj (68 aŭ 72 paĝaj, anstataŭ 36-) por povi publikigi, eventuale felietone, manuskriptojn, kiuj aparte konsistigus tro maldikajn broŝurojn...

... nu, la abonprezo de "**Laŭte!**" devas iom post iom plialtiĝi.

Por tiuj, kiuj deziras monprovizi por pluraj jaroj - kio ege simpligas la administran laboron! - jen la planita abontabelo por 1986 kaj 1987 (por pluaj jaroj ne eblas plani!):

Abono por 1986 : 28 FF.

Abono por 1987 : 30 FF.

Do, kiuj, okaze de sia (re)abono deziros anticipe "liberiĝi" por la du venontaj jaroj, tiuj bonvolu pagi 58 FF.

NOVAĴOJ ĈE SAT-BROŜURSERVO

* "**PROVERBARO FRANCA-ESPERANTA**" de Lucien Bourgois estas jam (re)havebla. 68 paĝoj kun ilustraĵoj en A5-formato. Mendkodo : PF, Prezo : 12 FF.

* "**Laŭ la fluo de l'interparolo**", de la sama aŭtoro, estas elĉerpita ĉe SAT-BS, sed plu mendebla ĉe : L. Bourgois, 29 rue Gambetta, F 62950 NOVELLES GODAULT

* "**Nekonato : LA ZAMENHOFA HOMARANISMO**" (A. Caubel) kiu aperas en tiu ĉi n-ro, estas mendebla ankaŭ kiel aparta broŝuro. (ZH, prezo : 3 FF). Kvanto tre limigita!

* "**KIO ESTAS S.A.T.?**" de Henri Masson estas ĵus reeldonita. Sama teksto sed aldone troviĝas la tekstoj de la Kongres-deklaracioj de 1984 kaj 1985. (SA, 3 FF).

Mendu amase rekte al SAT, 67 av. Gambetta, 75020 Paris aŭ al SAT-Broŝurservo.

Geabonantoj de la Broŝurservo, vi tre baldaŭ ricevos la broŝurojn aŭtomate. Samtempe vi ekscios pri la stato de via monproviza konto. Se tia aranĝo plu interesas vin, bonvolu eventuale reprovizi okaze de la jarfino. Dankon !

NE MALŜPARU !

Posedantoj de poŝtkonto, ne malŝparu, kiam vi mendas aŭ abonas! Sur ĉiu ĝirkupono estas sufiĉe da loko por koncize mencii la celon de via ĝiro. Uzu eventuale la mendkodojn de la broŝurlisto. Sendu la ĝirilon al via pĉk-centro! Ankoraŭ pli ruze : Se vi loĝas en Francio kaj deziras mallonge skribi al L!/BS, kial ne uzi la saman rimedon ? Ekzemple, ĝiru 10 FF al L!/BS, uzante la ĝirkuponon kiel leterpaperon (oni povas relative multe skribi, se oni skribas maldike) kaj L!/BS respondos al vi samvoje, reĝirante al vi la 10 FF ! Tute laŭleĝe, kaj senkoste, do 4,40 FF ŝparitaj!!
